


universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



NOVAJ KOMUNIKILOJ POR LA KOSMEPOKO

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 81 La aprila kunsido de la Estraro de UEA
- 82 Pri la agado de la lokaj grupoj:
4. Kiel vivadigi niajn grupojn (Jaumotte)
- 83 Sveda Parlamento iniciatis oficialan studon pri la bezono de internacia lingvo
- 84 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 85 La pasinteco havas estontecon (Weigel)
- 88 Novaj komunikiloj por la kosmepoko: laseroj
- 89 Ĉu vi scias? (Esperanto en ciferoj)
Ĉu "Esperanto" estas legebla? (letero)
- 90 Ĉu vi scias? (respondoj)
- 91 Leteroj (Pickel, Nix)
Recenzoj
- 92 Ricevitaj eldonaĵoj
- 93 Mallongaj novaĵoj
Oomoto proponas altajn premiojn
- 94 La Juna Vivo
- 95 Esperanto en radio
En la grupoj
Nekrologoj Perrin, Asenjo
- 96 50-a Universala Kongreso, Tokio 1965
Memoriga kalendaro
- 97 Oficiala informilo n-ro 379
- 99 Anoncetoj

kovrila bildo

Eksperimentoj pri gaso-lensoj por gvido de lumradioj donas esperon, ke la eltrovo de lasera lumo malfermos novan epokon en telekomunikado. (Foto: Bell Telephone Laboratories) Vidu artikolon p. 88.

bildojn liveris

- 83 Pola Radio
- 84 Jan Šára
- 85 ĝis 87 Franz Hubmann
- 88 kaj 89 Bell Telephone Laboratories

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Situacio de la Asocio en la Jaro de Internacia Kunlaboro

La urĝa neceso kreskigi la membronombron, la apartaj bezonoj de la evoluantaj landoj, la granda disvastiĝo de la asocia agado en la Jaro de Internacia Kunlaboro, — jen la ĉefaj temoj kiuj okupis la Estraron de UEA, kiam ĝi kunsidis en la Centra Oficejo en Nederlando de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, la Direktorino de la C.O. kaj la redaktoro de "Esperanto". La tre ampleksa tagordo konkrete sentigis, kiel vastaj estas efektive jam la agadoj de UEA sur ĉiuj kampoj.

Tre seriozan atenton la kunsido dediĉis unuavice al la financoj. La jaro 1964, bedaŭrinde, finiĝis per malprofito de 7970,83 gld. Tion kaŭzis ĉefe la granda altiĝo de ĉiuj kostoj ankaŭ en Nederlando, kie troviĝas la C.O. kaj kie estas eldonataj ĉiuj asociaj organoj. La Estraro rigore konsideris la eblajn ŝparojn kaj rimedojn, sed konkludis, ke nur du eliroj entute estas eblaj, se oni deziras, ke la Asocio konservu sian nunan dinamismon kaj ne estu devigita malgrandigi la sferon de sia agado. La unua estus plue altigi la kotizojn, sed tion la Estraro principe ne deziris, kvankam la nunaj kotizoj estas ankoraŭ vere malaltaj kompare kun tiuj de aliaj samrangaj organizaĵoj. La dua solvo estas per ĉiuj fortoj altigi la nombron de individuaj membroj. Nur mil pliaj membroj forigus la problemon. La Estraro sekve energie apelacias al ĉiuj membroj, ke ili faru ĉion eblan por persone varbi novajn individuajn membrojn kaj por reanigi tiujn, kiuj forlasis la Asocion.

Nova rolo de la Fondaĵo Canuto

En ligo kun la agado Azio-Afriko, kiu jam komencas doni siajn fruktojn, la Estraro decidis konsiderinde fortikigi la Fondaĵon Canuto, siatempe kreitan honore al la forpasinta prezidanto de UEA por membrigi personojn el landoj, kie la transpago de kotizoj estas neebla. Ekde nun la Fondaĵo estos unuavice uzata por membrigi en la kategorio MA sindonajn novajn esperantistojn en la landoj de Afriko kaj Azio, kiuj ofte perdas sian kontakton kun la lingvo pro la neebleco aliĝi. Pro la aparta graveco de la agado en tiuj kontinentoj, la sumo de 5000 gld. estas transportita el la Propaganda Konto en la Fondaĵon Canuto. Krom tio la Estraro decidis apelacii al ĉiuj pli bonstataj membroj kontribui malavare al la Fondaĵo, kio samtempe helpas al antaŭenigo de la lingvo en Afriko kaj Azio. La Estraro mem kolektis inter si pliajn donacojn por la kotizoj de 17 MA kaj 6 J-MA. Kun tiuj kontribuoj la Fondaĵo sumiĝas en la nuna momento je 291 kotizoj MA, 6 J-MA kaj 1 MJ. Certe per tiuj, kaj per la ricevotaj donacoj, estos eble solidigi ekzemple la laboron de s-ino

Haudebine en Hindujo, kiu nun vojaĝas al Japanujo por tie ĉeesti la Kongreson kaj poste gvidi kursojn en Japanujo dum unu tuta jaro.

Pri la perspektivoj de la Universala Kongreso en Tokio esprimiĝis ĝenerale kontento. La aliĝado evoluas pli bone, ol oni antaŭvidis, kaj la Estraro povis aprobi la definitivan programon kaj novan, pli ampleksan buĝeton. Aliflanke, la 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj, anoncita por aŭgusto en Britujo, pro teknikaj kaŭzoj devis esti prokrastita ĝis 1966, kaj plej verŝajne okazos en Hungarujo tuj antaŭ aŭ post la U.K. en Budapeŝto.

Pri la asociaj eldonaĵoj apenaŭ necesas emfazi la gravan kreskon lastatempan: la ĉijara Jarlibro estas la plej ampleksa en la historio de UEA; "Kontakto" aperas regule kaj en bona prezento; "La Praktiko" gajnis plurajn centojn da novaj abonantoj. "Monda Kulturo", bedaŭrinde, ankoraŭ ne estas sufiĉe vaste konata kaj subtenata. En la eldonserio "Oriento-Okcidento" aŭspiciata de UEA jam aperis 5 titoloj, dum la sesa kaj sepa ("Martín Fierro" de José Hernández, kaj "Reĝo Lear" de Shakespeare) aperos tre baldaŭ. Por helpi al plua, tre necesa intensigo de la informagado, aperos novaj eldonoj de la seslingvaj faldfolioj de UEA.

Duflanka agado por la J.I.K.

Studinte la ĝisnunan reeĥon al la sugestoj por agado en la Jaro de Internacia Kunlaboro, la Estraro konstatis, ke, dum iuj punktoj de la speciala Laborplano (vidu "Esperanto" de januaro) estas sukcese plenumataj, aliaj flankoj de la laboro ankoraŭ postrestas. Tre rekomendinde estas, ke la landaj asocioj kaj lokaj grupoj en siaj kongresoj kaj kunvenoj dediĉu apartan atenton al la J.I.K. kaj al la ĝeneralaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj samloke instigu al plej energia kunlaboro por la Propono al U.N. (kolektado de subskriboj). Sur alia paĝo la leganto trovas detalojn pri la ĝisnunaj atingoj. Tiu tuta eksterordinara agado kompreneble postulas eksterordinarajn homajn kaj materiajn rimedojn, kaj la Estraro plue alvokas ĉiujn kontribui laŭpove al la Fondaĵo "Vastigo de la Agado", el kiu la ĉefaj kostoj estas pagataj.

La grava sukceso ĉe la Sveda Parlamento, la fakto ke entute ĉirkaŭ 300 kvalifitaj personoj ĉijare proponis UEA por la Nobel-Premio por Paco (inter ili, krom la antaŭe menciitaj, la tuta parlamenta social-demokrata partio en Italujo) kaj la prezentota Propono al U.N., ĉiuj kune kreas samtempe ege favorajn kondiĉojn por informado kaj ĝenerale por disvastiĝo de Esperanto, kaj gravajn respondecojn por ĉiuj anoj de UEA kaj por ĉiuj, kiuj parolas la Internacian Lingvon.

4 : KIEL VIVADIGI NIAJN LOKAJN GRUPOJN

Ne estas la estrarano de UEA pri landaj asocioj, kiu intencas solene kaj instrucele alparoli vin, kara leganto, sed kontraŭe simpla grup-prezidanto, kiu tamen jam de 1927 sidadas malantaŭ la prezida tablo de iom grava grupo en same grava havenurbo, kaj kiu deziras iom babili kun vi: homo, do, kiu dum proks. 38 jaroj ĉiusemajne bonvenigis kaj bonvenigas la ĉeestantojn, gratulas ilin pro agrablaj okazaĵoj kaj kondolencas pri funebraj, rakontas la plej gravajn novaĵojn rilate al Esperanto, prezentas la parolonton aŭ tiun, kiu prizorgos la ĉefpladon de la vespero, kaj ankaŭ dankas lin, post la finaj aplaŭdoj.

Kaj estas pro tio, ke li en tiu longa tempodaŭro devis pripensi ĉiam aliajn programojn por allogi kaj konservi sian membraron, ke li kuraĝas proponi al la grupgvidantoj tian babiladon.

Kion mi do plej forte spertis en tiuj 38 jaroj estas tio, ke la ĝenerala socio multe evoluis, kaj ke la Esperanto-societoj, kvankam eble ne tiel multe, tamen tute certe ankaŭ evoluis. Tio signifas, ke nia labormaniero kaj programo ne plu povas esti hodiaŭ la samaj, kiel antaŭ 35-40 jaroj.

Antaŭ 40 jaroj, apenaŭ ekzistis la radio, la homoj nur komencis liberiĝi de tro longaj, tro pezaj labortagoj, ili deziris "profiti" el sia libera tempo — plej ofte elkurante sian hejmon, en tiu tempo ofte ne pli komforta nek pli alloga ol la malgaja laborejo. Kaj, dum multaj kontentiĝis per sidado en kafeja salono, same multaj, kun plezuro, serĉis distron iom pli altnivelan, ĉeestante kunsidon de societo aŭ klubo.

Nun la homoj al kutimiĝis ne nur al sia ĉiam kreskanta libereco... Ili same al kutimiĝis al pli granda hejma komforto, ankaŭ sur la distra kampo: la tiam apenaŭ naskiĝinta radio estas nun anstataŭita de la multe pli altira kaj hejme restiganta televido. Kontraŭe al la kinejo, kiu unue al kutimigis ilin al bezono de bildoj, ĝi nun alportas tiujn bildojn, kune kun muziko ĉiuspeca, en la hejmon mem.

Eltiri la komencontojn

Kaj vole-nevole, nia celo ja devas esti eltiri nian komenconton de Esperanto, same kiel nian simplan membron, el tiu agrabla fotelo, en kiu li kutime sidadas por daŭre, senpripense kaj ofte senelekte engluti bildojn... Kun la scio, ke — se oni sukcesos lin eltiri el tiu fotelo — lia nura emo estos ankoraŭ aŭskulti muzikan bruon kaj ankoraŭ vidi pli multe, ĉiam pli multe da bildoj!

Kaj serioza, kleriga, altnivela parolado, eĉ de lertulo, povas interesi lin eble unufoje — ni diru do: escepte — sed certe ne ofte, se

ĝi ne estas akompanata kaj ilustrata per sonbendaj ekzemploj kaj per klarigaj bildoj, eventuale senmovaj, se ili almenaŭ estas kolorigitaj (diapozitivaj), aŭ plenmovaj (filmoj, prefere same kolorplenaj).

Tiel, en epoko, kiam la eldonistoj estas devigataj eldoni "resumolibrojn", kiuj en kelkaj minutoj instruas la plej gravan pri la plej diversaj temoj, la vizitanto al grupo volas trovi en la programo kompenson por tio, kion li eble perdis pro sia eliro el la hejmo. Kaj, se li ne trovas, iom regule, tiun kompenson en la grupo, li facile lasos sin reallogiĝi al la programo, kiun en tiu vespero anoncas la TV.

Sonbendoj kaj diapozitivaj

Tial ankaŭ ni devas uzi la sonbendon kaj la diapozitivaparaton, pri kiuj certe povas nun disponi multaj grupoj (pro la simpla fakto, ke tre ofte membro posedas unu el ambaŭ). Al la grupoj iom pli riĉaj mi plej serioze volas konsili la aĉeton de epidiaskopoj, tiu nekomplika aparato, kiu, dank' al spegulo, permesas projekcii sur ekranon kiun ajn dokumenton, ek de la simpla ilustrita poŝtkarto ĝis la plej grava dokumento el scienca libro.

Kaj tiuj, kiuj povas, klopodu ankaŭ disponi kelkfoje en la jaro pri kina aparato: multaj ambasadorejoj senpage disponigas al kiu petas belegajn kolorfilmojn, kaj same faras pluraj petrolkompanioj kaj aliaj industrioj. Tiuj filmoj, mi ja scias, ekzistas nur en kelkaj lingvoj kaj do ne ŝajnas trafaj por Esperanto-grupoj. Nia grupo tamen uzas ilin regule kaj devigas nin mem traduki kaj surbendigi almenaŭ unu el la tri dum unu vespero montrotaj filmoj; kaj ni kontentiĝas, por la du aliaj, per la teksto en iu nacia, por ni ofte duone fremda lingvo... Sed imagu, ke multaj grupoj imitus nin, ke multaj grupoj dise en la mondo organizus kelkajn tiajn film-vesperojn kaj ĉiam tradukus nur unu el la tri montrotaj filmoj... kaj disponigus la sonbendon ankaŭ al aliaj grupoj! Baldaŭ ni posedus longan liston de filmoj plej belaj, plej interesaj kaj kulturaj, kun surbendigita traduko; kaj same baldaŭ ni povus organizi tiajn prezentadojn, por kiuj ĉiuj filmoj estus esperantlingvaj!

Tamen, ĉar diversaj grupoj eble respondos, ke ili mem havas tro malmulte da membroj kaj tro malmulte da mono por aĉeti kiun ajn aparaton, kaj ke ankaŭ neniuj el iliaj membroj posedas tian aparaton, mi volas ankaŭ ilin speciale priatenti. Kaj mi volas diri, ke (favore al tiaj grupoj en propra lando) mi jam de kelkaj jaroj eltondis el du ĵurnaloj, ĉiutage, du bildseriojn, kun mallonga teksto, kiuj, kvazaŭ felietone, pritemas pentriston, muzi-

(daŭrigo dekstre)

iniciatis oficialan studon pri la bezono de internacia lingvo.

La svedaj parlamentanoj Einar Dahl en la unua ĉambro kaj Sven Mellqvist en la dua ĉambro kune kun 31 aliaj parlamentanoj faris la proponon, ke la parlamento komisiu al la registaro iniciati sciencan esploron pri la eblecoj akcepti la Internacian Lingvon Esperanto apud la naciaj lingvoj. Tiun sciencan esploron faru komisiono, elektita de Unuiĝintaj Nacioj aŭ de Unesko.

La prepara komisiono, kiu havis la taskon pristudi la demandon, en sia prijuĝo principe akceptis la argumentadon de la proponintoj, sed proponis, ke la registaro levu la demandon ne en Unuiĝintaj Nacioj (kion la propono rekomendas), sed en Unesko.

La parlamento traktis la proponon je 10 marto 1965. En la unua ĉambro s-ro Dahl kaj en la dua ĉambro s-ro Mellqvist esprimis sian ĝojon pro tio, ke la komisiono unuanime opiniis la demandon grava kaj esplorenda. Ili akcentis, ke tiu ĉi problemo havas apartan aktualecon ĝuste nun, ĉar Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke la jaro 1965 estu "La jaro de internacia kunlaboro". Kvankam la komisiono en sia pledado rekomendas, ke tiu ĉi afero estu traktata de Unesko, la prijuĝo de la komisiono povas ricevi la subtenon ankaŭ de la proponintoj, ĉar la komisiono finas sian prijuĝon per sugesto, ke la registaro havu la rajton elekti la vojon, kiun ĝi trovas plej taŭga por realigi la intencojn de la propono.

En la unua ĉambro du aliaj parlamentanoj petis la parolon, kaj el ili unu estis iom skeptika, sed ne faris kontraŭproponon. En la dua ĉambro parolis nur unu alia parlamentano, krom s-ro Mellqvist, kaj rekomendis la proponon.

Post tio la du ĉambroj de la parlamento unuanime akceptis la proponon de la komisiono.

Laŭ la baza teksto de la proponintoj, multaj malgrandaj popoloj, kiel la sveda, nuntempe trovas sin sub forta premo pro la devo lerni plurajn fremdajn lingvojn por la bezonoj de

internaciaj rilatoj. Tial necesus esplori la eblecojn, akcepti unu solan lingvon por ĉiuj tiaj rilatoj. Laŭ la proponintoj, la supera internacia instanco (UN aŭ Unesko) elektu specialan komisionon el diversnaciaj filologoj, ekonomiistoj, statistikistoj, sociologoj k.a., kiuj havus la taskon funde esplori la nunan staton de la lingva problemo, ekzemple la kostojn de lingvo-lernado, interpretado ktp., kaj prezenti ĉiujn siajn konstatojn en konkreta formo, tiel ke estus eble atingi bone bazitan kaj science validan konkludon.

Oni nun atendas, ke ankaŭ en aliaj landoj estu faritaj similaj iniciatoj.

S-ro Einar Dahl, la ĉefa aginto en la iniciato de la Sveda Parlamento, pro gajno en konkurso de la Pola Radio ĵus faris senkoston viziton al Pollando. De maldekstre: sidas s-ino Dahl, s-ro Dahl, s-ino Stankiewicz, f-ino Sokalówna; staras s-ino Kempisty, s-ro Uśpieński, s-ro Rowiński kaj s-ro Grum.



kiston, artiston, scienciston aŭ iun historian eventon aŭ simile. Oni pensu pri tiu serieto de bildoj pri d-ro Zamenhof, kiun antaŭ kelkaj jaroj publikigis brita ĵurnalo. Nu, tiajn bild-seriojn nigra-blankajn mi posedas pri preskaŭ 300 temoj...

La avantaĝo de tiaj bildaroj estas, ke, se viajn grupkunsidojn ĉeestas nur deko da membroj, la bildojn oni povas montri de la prezida tablo, dum iu legas la klarigan tekston, aŭ dum iuj laŭvice legas la teksto-partojn, ekzerce. Se la kunvenantoj estas pli multaj kaj disponas pri epidiaskopoj, la bildoj povas esti projekciataj, kaj se la grupo disponas samtempe pri sonbenda aparato, la teksto povas esti disaŭdigata... kaj eventuale kon-

servata por aŭdigo en aliaj grupoj.

Vi komprenos, ke pro miaj spertoj kiel prezidanto dum tiom da jaroj mi povus sugesti al vi ankoraŭ multajn aliajn programerojn kaj programig-eblecojn. Mia celo hodiaŭ estas tamen nur atentigi vin pri la fakto, ke ne sufiĉas esti lingve lerta por sukcesi en la gvidado de grupo. Por ke grupo havu iun ŝancon vivadi kaj pluivivadi malgraŭ la evoluo de la Tempo, ĝiaj gvidantoj devas kompreni, ke tio ne okazos per daŭrigo de metodoj, kiuj iam estis aŭ ŝajnis trafaj!... Sed ke la sukceso kronos nur tiujn, kiuj gajnos la vetkuraĵon kun la Tempo, adaptante sian vivon al la novaj cirkonstancoj.

Maurice Jaumotte

esperanto
majo 1965



**la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto**

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

Stato je la 15-a de aprilo

Ĝis la mezo de aprilo la statistikoj de la Centra Oficejo en Rotterdam montris, ke jam revenis 4280 subskribo-folioj kun subskriboj de 81 848 individuoj kaj de precize 400 organizaĵoj kun entute ĉ. 5 600 000 membroj.

Kiel oni tuj vidas el tiuj ciferoj, la kolektado komencis plirapidiĝi, kvankam la nombro de individuoj estas ankoraŭ tre malproksima de la celo. Aliflanke, la nombro de organizaĵoj kreskas tre kontentige, se oni konsideras, ke por la Peticio al Unuigintaj Nacioj, prezentita en 1950, tiu nombro estis 492, kvankam la kolektado tiam daŭris plurajn jarojn anstataŭ nur unu jaron.

Utiligi la jamajn sukcesojn

Varbante subskribojn de gravaj personoj aŭ de grandaj organizaĵoj oni nepre apogu la peton sur la jam akiritaj sukcesoj. En ĉiu el la lastaj eldonoj de "Esperanto" troviĝas sub ĉi tiu sama rubriko informoj pri la plej konataj eminentuloj kaj organizaĵoj jam subskribintaj. Al tiuj oni povas nun aldoni la jenajn:

En pluraj landoj subskribis registaranoj — en Belgujo s-ro A. Bertrand, ministro pri trafiko; en Germanujo la samfaka ministro d-ro Hans-Christoph Seeböhm; en Hispanujo la ministro pri informado kaj turismo, s-ro D. Manuel Fraga-Iribarne. Ankaŭ s-ro István

Kossa, hungara eksministro pri trafiko, donis sian apogon. Aliaj notindaj estas d-ro G. A. Zinn, ministroprezidanto de la germana ŝtato Heslando, pastoro Martin Niemöller, prezidanto de la Mondkonsilantaro de Eklezioj, s-ro Bayard Rustin (Usono), ĉefhelpanto de d-ro Martin Luther King, s-ro Ernst Wehtje, konata sveda industriisto, Iris Murdoch, internacie konata angla romanistino, kaj la Rektoro de la Universitato Mainz, Germanujo. Inter la sesdeko da urbestroj la plej gravaj novaj estas tiuj de Vieno, Kolonjo, Mainz, Würzburg, Stoke-on-Trent, Rennes, Pisa, kaj Haarlem. Subskribis ankaŭ multaj parlamentanoj: en Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Israelo, Italujo, Jugoslavio kaj Usono.


Modela kunlaboro de FLE (Nederlando)

Krom la jam raportitaj nederlanda Laborpartio kaj Nederlanda Konfederacio de Sindikatoj, la laborista Esperanto-ligo FLE nun subskribigis ankaŭ la Asocion de Laboristaj Radio-Amatoroj (VARA), kiu estas parto de la Nederlanda Radio-Unuiĝo. Ĝiaj 493 000 membroj, kune kun tiuj de la organizaĵoj antaŭe varbitaj de FLE, sumiĝas je pli ol 1 100 000. Same gravaj estas la atingoj en Germanujo: subskribis du pliaj grandaj sindikatoj, nome tiuj de la Fervojistoj kaj de la Kemia-Papera-Ceramika Industrio. Du gravaj internaciaj organizaĵoj estas la "Secrétariat Professionnel International de l' Enseignement" (286 000 membroj) kaj la Internacia Federacio de Katolikaj Sindikatoj de la teksa kaj vestaĵa industrio (460 000 anoj), ambaŭ kun sidejo en Bruselo.

Nun streĉi ĉiujn fortojn

Kvankam en multaj landoj, necesis longa tempo por sufiĉe diskonigi kaj prepari la kampanjon, nun jam tiu stadio devus esti pasinta. Ĉiam pli proksimiĝas la baldaŭa limdato: oktobro, ĝis kiu nepre ĉiuj folioj estu resenditaj al la Centra Oficejo. La Propono ja estas speciala propono okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Tial estas absolute neeble, iel prokrasti la laboron, ĉar alie la afero perdos sian tutan aktualecon.

Multaj ekzemploj montras, ke kun iom da organizo kaj persisto vere bonaj rezultoj estas atingeblaj. Bulgara E-Asocio, ekzemple, faris specialan kolektadon okaze de la Internacia Tago de Virinoj. En Japanujo la tuta organizaĵo Oomoto oficiale organizas kolektadon paralele kun Japana E-Instituto. Samtempe ili peticias al la parlamento pri deviga instruado de Esperanto en lernejoj. Tiucele ili distribuas 500 000 informilojn dum aprilo, majo kaj junio. S-ro Standi Čáp en Ĉeĥoslovakio kolektis persone pli ol 3000 individuajn subskribojn; s-ro Max Müller en Germanujo pli ol 1500. Kaj vi?




S-ro Franz Jonas, Urbestro de Vieno kaj apoganto de la Propono al UN, estas ankaŭ kandidato por la prezidanteco de Aŭstrujo. Kiam en februaro li vizitis Pragon, okazis oficiala aranĝo en la aŭstra ambasadejo, kun ĉeesto de brita, franca kaj usona ambasadanoj kaj kun parolado en Esperanto. La foto montras s-ron Jonas intervjuata de s-ino Hodková (Radio Prago), kun dekstre la prezidanto kaj sekretario de la E-klubo de Prago.

LA PASINTECO HAVAS ESTONTECON

Hans Weigel

Pri Vieno — urbo de la Eŭropa
Esperanto-Konferenco, 11-17 julio 1965



Kio estas Aŭstrio, tio estis kaj restas neklara kaj malcerta kaj preskaŭ ne difinebla. Kio estas Vieno, tion oni scias tre precize; sed oni havas malfacilaĵojn, se oni volas formuli ĝin.

Vieno estas inter ĉiuj belaj urboj de la mondo supozeble la plej malbela. La malbelaĵoj de Vieno ne interrompas la belaĵojn, ankaŭ ne kontrapunktas ilin, sed estas ilia esenca parto.

Ke belaj konstruaĵoj, belaj placoj, belaj ĝardenoj, belaj arĥitekturaj solvoj kaj belaj perspektivoj estas belaj, tio ne estas tre miriga. Sed ke malbelaj konstruaĵoj, misformitaj placoj, fuŝitaj arĥitekturaj solvoj kaj konstruajkovritaj perspektivoj en masiva denseco tamen ne ĝenas la belecon de urbo, sed partoprenas en ĝi, tio estas artaĵo atingita krom de Vieno eble ankoraŭ de la urbo Parizo. Sed tie ŝajnas la malbelaĵoj nur akcesoraj kaj ne esencaj.

La beleco de la urbo Vieno jaron post jaro fariĝas pli signifa kaj pli intensa; ĉar de antaŭ pli ol unu jarcento oni pekas jaron post jaro intence kaj neglekte, konsekvence kaj hazarde, laŭplane kaj senpense, malbonvole kaj bonvole, per agoj kaj preterlasoj kontraŭ la beleco de la urbo Vieno, kaj tamen ĉiam ankoraŭ validas pli ol iam la klasika parolo — duone danĝera minaco kaj duone konsola promeso: Vieno restas Vieno!

Odoroj en la optiko

La italaj urboj havas sian amason da odoroj, kiuj — unuope apenaŭ de grandioza ĉarmo — komune, unuj kun, apud, tra kaj kontraŭ la aliaj, peras specifan impreson, individuan specialecon de granda ĉarmo: odoroj de fiŝoj, fruktoj, katoj, oleo, fromaĝo, kaj multaj aliaj. La urbo Vieno estas traduko de tiu propreco el la itala en la optikon. En Vieno odoras

fasadoj, lanternoj, firmotabuloj, montrofenestroj, veturiloj, restoracioj, ja: eĉ fizionomioj laŭ Balkano, laŭ Puszta, laŭ Hispanujo aŭ Lombardio, laŭ Adriatiko, laŭ Karpatoj, laŭ Hraĝin, laŭ fisko, kazerno, distriktestraro, latrino en slavaj-madjaraj-kroataj-slovakaj-rutenaj-dolomitaj-friulaj-dalmatiaj-polaj-sileziaj-moraviaj-bohemaj distriktoj — oni povus ankaŭ diri: laŭ Joseph Roth, Jaroslav Hašek, Nestroy, Ödön von Horváth, Franz Kafka, laŭ Molnár, Schnitzler, Smetana, Dvořák, Egon Erwin Kisch —, ĉiurilate do laŭ multlingve kompleksaj pasintecoj sen reala respondo en la preskaŭ duonjarcenton ekzistanta alpa respubliko de la naŭ federaciaj landoj: Vieno, Malsupra Aŭstrio, Supra Aŭstrio, Salzburgo, Tirol, Vorarlberg, Stirio, Karintio kaj Burgenlando.

La pasinteco havas ĉi tie tre grandan potencon kaj trafenetas la estantecon. La hororoj de la pasintecoj baldaŭ fariĝas emociaj kaj mallonge poste respektindaj, ekzemple la politikaj hororoj de la agonianta imperiestra-reĝa monarĥio, sed same la urb-konstruaj hororoj de ĝia ĉefurbo. Oni diras pri la spiritaĵoj kaj artistaj famuloj de Vieno: Ĉe ni iu estas tiel longe espero, ĝis li estas dojeno. Same oni povus diri: Ĉe ni konstruaĵo estas tiel longe skandalo, ĝis ĝi akiras leĝan protekton kiel monumento. Eble la urbaj konstrumastroj tial igas konstrui la novajn Vienajn domegojn tiaj, kiaj ili estas konstruataj de antaŭ longa tempo: ke ili baldaŭ montras fendojn kaj krevojn — kaj eksmodiĝintajn formojn krome —, por ke ili plejeble frue estu enprenataj en la respektindecon de la pasinteco.

Oni diras tiel volonte, ke en Vieno ĉie ajn ĉeestas ankoraŭ la imperiestro Franz Joseph, ke la homoj ĉi tie, precipe la pli aĝaj homoj, havas en si ankoraŭ tiel multon de la monar-

Schönbrunn, Vieno:
arto kaj pseŭdoarto


esperanto
majo 1965

Vieno

ĥio. Sed hodiaŭa sepdekjarulo estis dudek-unujara, kiam mortis la eterna maljuna imperiestro. ("La imperiestro mortis", oni tiam diris en Vieno, "sed oni ne kuraĝas, ĝin al li diri — li povus ektimi.") Kiel dudek-unujarulo de 1916 povas esti tiel plenigita de Habsburg-a atmosfero, ke li kiel sepdekjarulo ŝajnas ankoraŭ kiel sepdekjarulo el la tiama tempo?

Kaj tamen: En 1918 armeo disrompiĝis ĝis neniama revido, ĝi estas preskaŭ jam duonan jarcenton dissolvita, malaperinta, apenaŭ plu memorata; sed la orkestroj de tiu armeo ankoraŭ ekzistas, prezentludas, trairadas la mondon kiel senmortaj, fanfarantaj ambasadoroj de finvivinta antaŭmondo. Vilhelmo II-a estis vivanta kadavro, kiam li mortis dum la dua mondmilito. Franz Joseph la Unua mortis jam dum la unua mondmilito kaj ŝajnas regi ankoraŭ ĉiam (li do ĵus festis sian cent-dekkvinan regojubileon). Kvankam jam dum lia

*La Franziskaner-placo
en baroka spegulo
ĉe antikvaĵisto*



vivotempo estis, kvazaŭ la maljuna sinjoro efektive jam delonge ne plu regus.

Iam, en neimageble malproksima tempo, en kiu imperiestro Franz Joseph ankoraŭ ne estis imperiestro, vasten rigardantaj fortoj kaj potencoj en la tiam tre malgranda urbo Vieno ŝajne kolektis gigantajn rezervojn de la ĝermoj de l' grandeco, zorge-profete kiel zorgemaj patroj, kiuj volas sekurigi infanojn kaj infanidojn. Ĉar post kiam Franz Joseph fariĝis imperiestro (oni tentiĝas, anonci tiun okazaĵon jene: En la jaro 1848 la tiam dekokjara maljuna imperiestro suriris la tronon), ne plu estas multo farita por Vieno kaj tamen multo okazis en Vieno. La urbo kreskis al la dudekobla amplekso kaj ricevis sian faman bulvardon, la plej belan straton de la mondo, kun la plej malbelaj el ĉiuj monumentecaj konstruaĵoj. Multo estis malkonstruita, tio estis amara, multo estis konstruita, tio estis pli amara, multo ruiniĝis en du militoj kaj du postmilitaj tempoj, multo estis detruita dum la dua milito, multo estis aĉigita de filoj de la urbo kaj de urbopatroj — kaj ankoraŭ ĉiam la atestoj de la pasinteco ekzistas dense kaj efike kaj destinas la vizaĝon de bela urbo.

Tamen oni pripensu, ke "baroko" kaj "rokoko" en la Viena lingvouzo signifas multe pli kaj ion tute alian ol arthistoriaj terminoj. Tion oni legas ĉe Johann Nestroy, la netaksebla gvidanto tra la misteroj de la Viena specialeco por ĉiuj ne-Vienanoj, kiuj legas lin, kio tamen estas ĝenata per la fakto, ke ne-Vienanoj ne kapablas legi Johann Nestroy. "Baroko" signifas proksimume "neordinara, absurda, troigita" — "Rokoko" estas "malnoviĝinta, antikveca, stranga".

Aĉeco fariĝas imponeco

Tiel baroko kaj rokoko etendiĝas malproksimen trans arĥitekturajn epokojn kaj pure artajn sferojn ĝis en la estantecon, tiel Vieno estas ankoraŭ baroka kaj rokoka urbo, ĉar Vieno kulturas la malnoviĝintajn, la troigitajn, la strangajn kaj antikvecajn aferojn kaj pli-altigas la aĉecon al tiaj gradoj, ke ĝi renversigas kaj senpere transiras en la imponecon. La Viena vitaleco havas specialan proprecon. Ĝi gajnas siajn fortontojn el la senespero kaj la malsupereco, ĝi inspiriĝas per la memneniigo kaj volonte vestas sin per la vesto de la degenero. La baza tono de Vieno estas la maltroigo (eĉ larĝaj stratoj ekzemple nomiĝas ĉi tie ofte "strateto"), la sindefendo maskas sin kiel agonio, la neoficiala nacia himno "Ho vi mia Aŭstrio" estas komponita sopirĝemo (la oficialan konas neniu ajn, escepte de lernejaĵ infanoj).

Unu el la plej grandaj dokumentoj de la aŭstra literaturo estas la plej impeta kaj neniiga akuzo de Vienano kontraŭ Vieno kaj ne nur nomiĝas "La lastaj tagoj de la homaro", sed ankaŭ pravas konklude, ke la homaro pereis en Vieno kaj per Vieno dum la jaroj 1914 ĝis 1918. Tiu malantaŭen turniĝinta profetaĵo estas refutita sole per tio, ke ĝi post la

datumita fino de la homaro aperis en libro-formo kaj ke ĝia aŭtoro Karl Kraus, la insultanto al sia hejmlando, nun iom post iom estas ekhonorata en ĝi. Sur lia loĝdomo troviĝas de antaŭ longe memortabulo.

Vieno devis esti intereseĝaĵo por Hegel (kaj tio nuntempe pli ol iam). Ĉar Vieno konsistas en la dialekta kontraŭdiro, kiu unuigas neunuigeblaĵojn, Vieno estas sintezo de antitezoj kiel bela-malbela, malnova-nova... kaj ankaŭ: nobla-vulgara... kaj ankaŭ: mondurbo-malgrandurbo... kaj ankaŭ: arto-pseŭdoarto... kaj ankaŭ: profesiulo-diletanto... kaj ankaŭ: signifa-rekonita. Jen efikas surpriza egaliga justeco de propra speco: Per premioj kronataj, per honoroj supersutataj estas tute ne la signifaj Vienanoj, sed la kapoj, kiuj pruveble disponas nur pri modestaj kapabloj. La vere grandaj spirithavantoj restas flanke. Kial ilin honori kaj distingi, ĉar ili ja estas vere signifaj kaj eksterlande prave glorataj, dum la aliaj (la bedaŭrinduloj!) havas kaj povas havi nenion alian ol iom da gloro kaj la multajn honorojn, per kiuj supersutas ilin sinjoro la ministro kaj sinjoro la urbestro.

Kontraŭdiroj de la Vienanoj

La Vienanoj estas gaja homtipo de granda malgajeco, facilvivema popolo de melankolie-deprimita baza agordo, ili estas alte talentitaj, sed la senkompataj malamiko de sia talento, ili nur fartas bone, se ili malbonfartas, kaj la nuna epoko de la prosperanta stabileco estas por ili unu el la plej severaj eltenprovoj dum du jarcentoj; ĉar je tio ili ne estis preparitaj.

En Vieno la arto etendiĝas ĝis tre malalte kaj la pseŭdo-arto etendiĝas ĝis tre alte. La tielnomita "Gemütlichkeit" (= hejmeco, senĝeneco) estas nur eksportartiklo, kaj la legendeaj malordemo kaj nelaboremo estas nur laborhipotezoj kun la celo faciligi la ĉiutagan vivon. Ankaŭ la superforto de la burokratio tute konscie estas troigata. Ĉar se la burokratio vere praktikus tian ĉiean ĉiopovon, kiel oni atribuas al ĝi, se oni laborus en Vieno tiel neglekte kaj tiel malmulte, kiel la Vienanoj kredigas tion al si, unuj al la aliaj, kaj al la mondo, Vieno de antaŭ longe estus egaliginta al la stato de Ninevo aŭ Pompejo, neniuj publika aŭ privata institucio estus kapabla por la plej malgranda agado, kaj ĉiuj Vienanoj estus mortintaj en la plej frua suĉinfana aĝo. Vieno nomis sin mem foje en la dudekaj jaroj de tiu ĉi jarcento, "mortanta urbo" — cetere en sukcesa modkanto —, kaj estas konate, ke false mortanoncitoj havas aparte longan kaj persistan vivon. Vieno pasie turnas sin al sia pasinteco kaj intense devenas de ĝi, ĉar tiu pasinteco dum multaj generacioj estis plenigita de perea agordo kaj ĉar Vieno laŭ komplikita psikologia ĉirkaŭvojo gajnas el la fakto de iamaj katastrof-anoncoj (Lastaj tagoj de la homaro, Mortanta urbo ktp. ktp.) fortojn de la memdefendo por la estonteco. La unua Viena valso havis la refrenon: "Ĉio estas for."



Vieno sentas sin fratigita al la pereco, anoncante kaj neante ĝin sammomente, nomante ĝin senpere minacanta (Nestroy: La mondo ĉiukaze ne plu longe staros!), sed kalkulante tiun senperan minacon laŭ paralela antaŭenŝovo ĉiam por la koncerna morgaŭa tago. Vieno festas la pereon, farante el la "bela enterigo" popolfeston.

En Vieno kolektiĝas ĉiuj kontraŭdiroj al homogena unueco, en Vieno estiĝas la jesado neniam laŭ rekta vojo, sed nur per plurfojaj, sin reciproke nuligantaj neadoj. Vieno vivas, pereante ek de pratempoj tagon post tago, aŭ starante mallonge antaŭ la definitiva dissolviĝo.

Inter la linioj de la Viena kroniko troviĝas kiel dominanta koncentraĵo de specifa teniĝo la parolo: Vieno mortis — vivu Vieno!

Kun afabla permeso de la revuo "magnum" (Kolonjo) tradukis el la germana Klaus Perko.

"Gaja homtipo de granda malgajeco"

**esperanto
majo 1965**

NOVAJ KOMUNIKILOJ POR LA KOSMEPOKO : LASEROJ

Kiam temas pri internacia kunlaboro, aŭtomate oni ekpensas pri komunikado. Unuflanke oni konstatas (ekzemple en la Propono al Unuiĝintaj Nacioj), ke facila kaj efika komunikado estas absolute necesa por internacia kunlaboro. Se, aliflanke, oni pripensas, kiom da komunikado jam okazas trans la ŝtataj limoj, precipe sur la kampo de telefono, radio kaj televido, oni komencas kompreni, kia amaso da kunlaboro devas jam ekzisti, por ke ĉio funkciadu harmonie. Kaj nun ŝajnas, ke la homaro staras antaŭ la ebleco de nova, globampleksa telekomunika sistemo, kiu per sia kvalito kaj kapacito superus ĉion ĝisnunan, kaj kies efektivigo kaj prizorgado postulus plej intiman kunlaboron sur ĉiuj kontinentoj.


Ĝis la invento de radio-komunikado, la homoj ĉiam komunikis inter si unuavice per sonoj: aŭdeblaj ondoj kun frekvenco de nur kelkaj miloj da vibroj en sekundo. Kontraste, radio-elsendoj utiligas neaŭdeblajn ondojn, kies frekvenco atingas ĝis kelkaj milionoj da cikloj sekunde (c/s). Sed la principo, sur kiu baziĝas la radio-komunikado, havas multe pli vastan gravecon, ĉar ĝi estas aplikebla, teorie, al ĉiuj regulaj ondoj. Temas pri la ebleco serviĝi unu ondon kiel portanton de alia: nome, surmeti sur la portantan ondon (kiu estu de alta frekvenco, forta kaj stabila) la ondojn de la homa voĉo aŭ alia signalo, tiel ke, per inversa procedo, ili estos depreneblaj

des pli da mesaĝoj ĝi povas porti. Estas do facile kompreneble, kiel avantaĝa estus la uzo de lumo kiel portanta ondo, ĉar ĝiaj ondoj, kun frekvenco de kelkcent bilionoj da cikloj sekunde, povus porti cent-milionoble tiom da mesaĝoj, kiom kapablas la kutimaj radio-ondoj.

Lumo kiel komunikilo

Ĝis antaŭnelonge, lumo kiel komunikilo estis nura utopio. Ĉiuj portantaj ondoj devas esti regulaj, fortaj kaj konstantaj. Male, la lumondoj el ordinaraĵoj kaj aliaj fontoj estas tute neregulaj, kaj emas perdi sian forton pro malfokusiĝo. Eltrovo en Usono en 1960 donis esperon, ke ĉiuj ĉi baroj estos venkitaj. Tiea esploranto sukcesis konstrui la unuan "laseron", revolucia aparato, kiu produktas mallargan, intensan lumradion kun preskaŭ perfekta reguleco (kaj, sekve, de tre pura koloro). La nomo estas konstruita el komencliteroj: Lum-Amplifo per Stimulita Eligo de Radioj. Lumo produktita per tia aparato estas tiel intensa, ke ĝi facile traboras diamanton, kaj tiel bone fokusebla, ke ĥirurgo povas uzi tre mallongan tian lumimpulson por elsarki unuopan ĉelon de la homa korpo. Sed ĝi havas la malavantaĝon, ke tiun mallargegan lumfaskon necesas celdirekti kun perfekta precizo, se entute ĝi trafu la ricevilon.

Skemo de la eksperimenta gaso-lenso en la foto sur nia kovrilo. La lumondo restas en la centro, eĉ se la tubo kurbiĝas. Helpe de tiaj lensoj verŝajne estos eble instalati reton da lum-kondukaj tuboj tra la tuta mondo por disporti telefonajn, radiajn kaj aliaj mesaĝojn.



kaj aŭdeblaj ĉe la ricevanto. Tiu ĉi sistemo — modulado — povas same bone utiligi portantan ondon de multe pli alta frekvenco, ol nur kelkaj milionoj da c/s. Efektive, en kelkaj landoj jam estas uzataj t.n. mikro-ondoj, kies frekvenco troviĝas en la regiono de kelkdek miliardoj da c/s.

La ĝenerala strebado de la teknikistoj, apliki ĉiam pli altajn frekvencojn kiel portantajn ondojn, havas tre simplan motivon: ju pli alta la frekvenco, des pli granda la inform-kapacito. Per aliaj vortoj, ju pli rapide vibras la ondo,

Por komunikado pere de satelitoj aŭ kun kosmoŝipoj, tiun problemon sendube solvos elektronaj kalkuliloj, nun jam uzataj por sekvi la pozicion de tiaj objektoj. Por surtera komunikado, aliflanke, la plej taŭga rimedo ŝajnas esti tiu sama, kiun oni jam aplikas por mikro-ondoj: transsendi la ondojn tra ondo-gvidiloj, t.e. tuboj, kiuj enhavas vakuon. Estas imageble, ke tuta reto da tiaj tuboj iam etendiĝos tra la mondo por gvidi lumradiojn de unu stacio al alia.

Antaŭ ol tio realiĝos, tamen, necesos solvi



Sciencistoj de Laboratorioj Bell en Nov-Jorko studas projekciaĵon de du samfrekvencaj laseroj (faz-ligitaĵ), en eksperimento pri la ebleco uzi du aŭ pli da laseroj en kombino por telekomunikado.

ankoraŭ kelkajn tiklajn problemojn. La ĉefa estas la demando, kiel kurbigi la lumondojn tie, kie la tuboj devos kurbigi? Kiel atingi, ke la lumo sekvu la linion de la tubo anstataŭ perdiĝi ĉe ĝiaj flankoj? Tradiciaj sistemoj por direkti lumon (speguloj, lensoj k.s.) en-sorbas tro da energio, tiel ke la ondo tro rapide malfortiĝus.

Esplorantoj de la laboratorioj Bell en Nov-Jorko opinias, ke ili proksimiĝas al taŭga solvo ankaŭ de tiu ĝenaĵo. Iliaj eksperimentoj (vidu ekzemple la kovrilan foton) utiligas la fakton, ke ankaŭ gasoj, kiel vitraj lensoj, deviigas la lumradiojn, se la denseco de la gaso ne estas egala. La apuda bildo montras skeman desegnaĵon de la eksperimenta "gaso-lenso" videbla maldekstre sur nia kovrilo. Temas pri unu el pluraj pristudataj sistemoj. En tiu ĉi sistemo, spirala varmigilo interne de la gasoplena komunika tubo densigas la gason ĉe ĝia centro (pro la normalaj fluoj, kiujn kaŭzas varmigo). Lumradio, kiu trapasas tian gason, ĉiam devias en la direkto de la pleja denseco. Sekve, la lasera ondo ĉiam sekvas la centron de la tubo, eĉ se la tubo kurbigaĵas. Pasante tra tia gaso-lenso, la lumradio tamen perdas tre malmulte el sia energio.

Ankoraŭ restas multaj malfacilaĵoj, kiujn necesos venki, se iam la esperoj pri tutmonda lumonda komunikado fariĝu efektivaĵo. Ĉefaj inter ili estas la demandoj, kiamaniere aldoni la signalon (t.e. la mesaĝon elsendendan) al la portanta lumondo, kaj kiel amplifi tian ondon. Nuntempe la esploroj estas ankoraŭ en relative frua stadio, kaj ne eblas antaŭdiri, kiam la unuaj praktikaj aplikoj aperos, nek ĉu ili estos laŭ kosto kompareblaj kun aliaj sistemoj nun ellaborataj. Sed la principa ebleco, transsendi sur unu sola lumradio tiom da informoj, kiom nuntempe portas ĉiuj radio-stacioj, televidaj stacioj, telefonsistemoj k.s. kune, estas tiel alloga, ke ĝi certe plu ricevos la dediĉitan atenton de la sciencistoj de la mondo.

Precipe en la nuna jaro, kiam ni faras grandajn klopodojn por atentigi la publikon kaj Unuiĝintajn Naciojn pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo per Esperanto, ĉiu, kiu prelegas, kolektas subskribojn aŭ alie kontaktas la publikon, devus esti kapabla respondi al la plej oftaj kvantaj demandoj pri la Internacia Lingvo. Ĉu VI scias . . .

- (a) Kiom da esperantistoj estas en la mondo?
- (b) Kiom el ili estas anoj de E-organizaĵoj?
- (c) Kiom da anoj havas UEA? En kiom da landoj?
- (ĉ) Kiom el ili estas Delegitoj de UEA?
- (d) Kiom da lernejoj lernas Esperanton? En kiom da lernejoj, kaj en kiom da landoj?
- (e) Kiom da personoj ĉeestas E-kongresojn?
- (f) Kiom ĉeestas la Universalajn Kongresojn?
- (g) Kiom da libroj estas eldonitaj en Eo?
- (ĝ) Kiom da libroj aperas ĉiujare?
- (h) Kiom da libroj estas nun aĉeteblaj?
- (ĥ) Kiom da lernolibroj aperis entute? Por kiom da popoloj?
- (i) Kiom da terminaroj aperis entute?
- (j) Kiom da turismaj prospektoj aperis?
- (ĵ) Kiom da radio-stacioj elsendas en Eo?
- (k) Kiom da esperantaj gazetoj aperas?
- (l) Kiom da landaj E-organizaĵoj? Kiom da fakaj kaj neneŭtralaj?
- (m) Kiom da E-societoj? en kiom da landoj?
- (n) Kiom da gramatikaj reguloj ekzistas en Esperanto?
- (o) Kiom da radikoj estas oficialaj? Kiom en Plena Vortaro kaj Suplemento?

RESPONDOJ APERAS SUR LA SEKVANTA PAĜO

ĈU "ESPERANTO" ESTAS LEGEBLA ?

letero

Mi, kiu havas 31 jarojn kaj bonan vidon, ne bone povas legi la artikolojn en "Esperanto", ĉar la literoj estas tre malgrandaj. Mi sci-volas, ĉu bone legas pli maljunaj abonantoj . . . Mi ĉiam feliĉe atendas ricevon de la gazeto, sed ne deziras ruinigi miajn okulojn !

C. Stanley Otto
Livingston, Usono, 7 jan. 65

Nia presejo disponas pri tri ĉefaj litertipoj por maŝinkompostado: la nun uzata (sep-punkta grandeco), la iom pli granda (8-punkta) tipo Futura, uzata por la rubriko La Juna Vivo, kaj ankoraŭ pli granda (9-punkta), uzita ekzemple en la anonco de Ytong en la febru-ara "Esperanto". Kompreneble, ju pli granda la litertipo, des pli facila la legado — sed des pli malmulta la enhavo. Verŝajne la plej bona kompromiso estus ia tipo 8-punkta, sed en la nuna tempo la sola 8-punkta disponebla estas tiu de "La Juna Vivo", en kiu la rekteco de la ofta litero "j" ŝajnas malhelpi fluan lega-don. — Red.

esperanto
majo 1965

ĈU VI SCIAS . . . ?

RESPONDOJ AL LA DEMANDOJ SUR LA PAĜO 89

(a) Ĉi tiu demando estas unu el la plej ofte farataj, sed inter la plej malfacile respondeblaj. Eraro estas, respondi tuj per iu konkreta cifero. Kontraste kun naciaj lingvoj, kiujn oni ĝenerale lernas denaske, Esperanto estas lernata ĝis plej diversaj gradoj. Unuj akiras nur pasivan scion, por legi aŭ aŭskulti radion, aliaj lernas flue paroli kaj skribi, dum je la alia ekstremo troviĝas multaj, kiuj nur supraĵe tralegis lernolibron aŭ parkeris kelkajn fraze-tojn. Pri kiuj do oni rajtas diri, ke ili "parolas" aŭ "scipovas" Esperanton? Kaj kiel entute eltrovi kaj nombri ilin? Prefere oni atentigu la demandanton pri ĉi tiuj malfacilaĵoj, kaj indiku anstataŭe la nombron de libroj aŭ periodaĵoj kiel mezurilon de la disvastiĝo de la lingvo. (Vidu sube)

(b) Precizaj informoj mankas, sed verŝajne ĉ. 60 000 pagas kotizon al iu organizaĵo.

(c) En 1964, UEA havis 7139 individuajn kaj 25 048 asociajn membrojn, entute do 32 187. Laŭ la divido uzata en la C.O., ili apartenas al 83 landoj, sed oni memoru, ke ekzistas diversaj difinoj de "lando".

(ĉ) La nombro de personoj, kiuj plenumas delegitajn oficojn, ne estas konata, sed la nombro de oficoj (delegitaj, fakdelegitaj ktp.) okupitaj en la fino de 1964 estis 3433 en 58 landoj.

(d) Laŭ la informoj ricevitaĵoj de CED por la jaro 1962/3, 16 272 infanoj kaj junuloj en 563 lernejoj de 32 landoj tiam lernis Esperanton per lernejoj kursoj (ciferoj minimumaj).

(e) En 1964 ĉirkaŭ 6000 personoj ĉeestis internaciajn, kaj pliaj 6000 la landajn E-kongresojn: entute do ĉ. 12 000.

(f) La postmilitajn UK-ojn ĉeestis meze 2000 personoj.

(g) Same kiel (a) ĉi tiu demando ne estas respondebla sen aldonaj klarigoj. Kio, nome, estas libro, kaj kio ne estas libro? Plej ofte oni enkalkulas ĉion, kio ampleksas minimume 16 paĝojn, sed tamen restas la demando, ĉu enkalkuli lernolibrojn de Esperanto, ĉu ankaŭ diversajn kongreslibrojn, jarlibrojn k.s. De-nove, do, estas plej bone unue atentigi la demandanton, ke li devus pliprecizigi la demandon. En 1964 la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno nombris 11 749 volumojn en sia kolekto, kio sendube ampleksas ankaŭ lernolibrojn, kongreslibrojn k.a. Belliteraturaj eldonaĵoj konsistigas eble trionon de tiu sumo.

(ĝ) En la rubriko "Nova Literaturo" en la Jarlibroj de UEA estis listigitaj dum la lastaj 7 jaroj entute 425 novaj eldonaĵoj (t.e. ĉ. 60 jare), el kiuj 307 (do 44 jare) estas tute en Esperanto (do ekskluzive de lernolibroj k.s.).

(h) En la librolisto de UEA troviĝas ĉ. 1000 diversaj eldonaĵoj nun aĉeteblaj.

(ĥ) Ĝustaj informoj pri lernolibroj estas malfacile eltroveblaj, sed verŝajne ekzistas pli

(eble eĉ multe pli) ol 2000 lernolibroj kaj vortaroj por kvindek da lingvoj. La libro-servo de UEA vendas lernolibrojn en 31 lingvoj krom la internaciaj, se oni enkalkulas ŝlosilojn kaj vortarojn.

(i) La nombro de fakaj terminaroj aparte eldonitaj (inkluzive de reviziitaj reeldonoj) estas nun 127.

(j) Entute aperis certe pli ol 1000 turismaj kaj komercaj prospektoj en Esperanto. Nur en la lastaj 12 monatoj aperis 27 novaj.

(ĵ) En 1964 okazis 1622 elsendoj en Esperanto el 22 stacioj en 11 landoj. Krome multaj stacioj elsendas en aliaj lingvoj pri Esperanto.

(k) Same kiel pri libroj, necesas unue de-mandi, kion oni komprenas per "gazeto"? Ĉu ili devas esti presitaj per difinita sistemo, ĉu aperi kun difinita ofteco? En la nova Jarlibro de UEA estas listigitaj 104 periodaĵoj, el kiuj 62 estas presitaj, 90 aperas minimume kvaron-jare, kaj 57 estas cent-pro-cente esperant-lingvaj. Krome aperas kelkaj dekoj da aliaj, sed neregule aŭ en tre modesta formo.

(l) Al UEA aliĝis ĝis nun 29 landaj organi-zaĵoj. Krome ekzistas 20 aliaj nealiĝintaj, el kiuj kelkaj havas iom nefirman ekziston: armena, ĉeĥoslovaka, ĉina, gvatemala, hinda, indonezia, islanda, konga, tri koreaj, kuba, libana, malta, meksika, rumana, sudafrika, tanzania, venezuela kaj vjetnama. Da fakaj aŭ neneŭtralaj asocioj ekzistas, krom la junu-lara sekcio de UEA (TEJO), 2 aliĝintaj kaj 19 kunlaborantaj.

(m) Laŭ la enketo de CED en 1964, en 38 landoj ekzistas entute minimume 1274 lokaj E-societoj, kun minimume 40 000 membroj. En tiuj sumoj tamen mankas la societoj de Sovet-unio, Aŭstralio kaj kelkaj aliaj landoj.

(n) Tro ofte demandantoj pri la esperanta gramatiko ricevas la respondon, ke ĝi konsis-tas el nur 16 reguloj. Al ĉiu iom klera persono estas kompreneble, ke por plena vivanta lingvo ne sufiĉas 16 reguloj, kaj tia respondo povas krei la impreson, ke temas pri ia primitiva interkomprenilo sen rimedoj por esprimi kom-plicitajn pensojn. Se entute oni mencias la ciferon 16, oni klare emfazu, ke tio estas la nombro de la plej fundamentaj reguloj. Sed prefere oni parolu, ne pri la nombro de reguloj, sed pri la preskaŭ tuta manko de neregulaĵoj kaj esceptoj.

(o) Radikoj oficialaj estas nuntempe 4529, dum en Plena Vortaro kaj Suplemento estas 7866. Kutime, tamen, la publiko demandas pri la nombro de vortoj en la lingvo, kaj al tio necesas klarigi, ke pro la tute unika strukturo de Esperanto la nombro de eblaj vortoj estas senlima. Tial komparo kun aliaj lingvoj ne estas facile farebla.

(Informoj bazitaj sur publikigoj de CED kaj aliaj fontoj)

Kun intereso mi legis la artikolon "Pri ideologio kaj ŝtato, rerigardo al la 8a Internacia Seminario de GEJ". Kvankam la artikolo bone respegulas la faktajn aranĝojn kaj rezultojn de la seminario, tamen ĝi iasence misprezentas du programerojn de la seminaria semajno.

La Zamenhof-solenaĵo estis oficiala parto de la seminario kaj ne nur aranĝo de la E-grupo Nürnberg. Ĉu vere la festparolado de prof. d-ro Lapenna pri la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj la diversformaj diskriminacioj en la internaciaj rilatoj okazis nur por "solene memori la 'majstron' kaj aŭskulti la movadan himnon"? Estas la rajto de la junularo prijuĝi la esperantistan tradicion kaj la valoron de la himno laŭ propraj konceptoj, sed elstarigi tiun starpunkton en kunligo kun vere elstara aranĝo, kiu je la sojlo de la jaro 1965 fariĝu kvazaŭ la oficiala inaŭguro de la Jaro de Internacia Kunlaboro simbole por la tuta mondo, en urbo, kie fakte naskiĝis la E-movado, tio estas maltaŭga.

"Estas nepre evitende, ke sin trudus iu vervulo, kiu per strangaj esprimoj kaj neĝustaj asertoj fuŝas la diskuton kun la gazetistoj — kiel okazis en Nürnberg." Ankaŭ ni esperan-

tistoj estas homoj kun ĉiuj neperfektaĵoj kaj ni devas kalkuli kun la pozitivaj kaj negativaj kvalitoj de la esperantistaro. Bona ĵurnalisto estas lerta psikologo kaj li ne estas misgvidata de iu "strangulo", li restas objektiva, se li ricevas aŭtentikan impreson. Ni havu pli da memfido al nia afero kaj pli da kuraĝo ĝin prezenti laŭ ĉiuj realecaj aspektoj al la publiko. La bonega rezulto en Nürnberg estas la ĝusta respondo al tiu aserto.

Ludwig Pickel
Nürnberg, 7 marto 1965

KIES LA REKORDO ?

Mia edzino (belga) kaj mi, veterana geedza paro, superas la rekordon de ges-roj Yelland ("Esperanto" 1964, jul-aŭg. p. 127). Jen la komparo:

Ni ellernis Esperanton en 1905-07. Ni konatiĝis en 1910 (Ges-roj Y. 1915); geedziĝis en 1919 (Ges-roj Y. 1921). Nia familia lingvo estis dum la pasintaj 45 jaroj, kaj ankoraŭ estas, ekskluzive Esperanto. Do nia rekordo sumas 45 jarojn kontraŭ 43 de ges-roj Yelland.

John P. Nix,
Anglujo.

La turo inter nuboj, dramo pri Sankta Barbara, de Jan kaj Karel Filip. Eld. IKUE, Nederlando, 1964. Serio Kristana Kulturo n-ro 4. 96 p. 19 × 12 cm. Prezo: 3,50 gld. (14 st).*

La titolon de la dramo mi kuraĝus parafrazi jene: S-ta Barbara inter katolikoj kaj idoloj, alivorte la vivo de la sanktulino inter spirito kaj materio. Jen la kerno de la kvinakta dramo de ĉeĥoslovakaj sacerdotoj — fratoj Jan kaj Karel Filip.

Dum la legado ni eniradetas la misteron de la vivo, ekkonas la animon de la heroino. Senfine obea al la Krucumito, ne timigas ŝin eĉ la abismo kreskanta inter ŝi kaj pagana patro Dioskuro. Li — la princo de Bitinio — traktante kristanismon kiel doktrino revolucia, plena de danĝeroj, ne nur senheredigas la filinon, sed per la manoj de sia servanto bruligvundis ŝian lumbon, detranĉis ŝiajn manojn. Kiam nenio frakasas ŝian obstinecon kaj ne forvipas el ŝi la kristanismon li ordonas senkapigi Barbaran; krome la teruran verdikton li mem plenumas... La lasta akto, la akto de la pereintoj kaj viktimoj, estas korskua tragedio inter progreso kaj regreso.

Walerian Włodarczyk (Varsovio)

Kvinteto, el verkoj de Nao, Onisabro, Sumiko, Hidemaru kaj Naohi Deguĉi tr. T. Nakamura. Eld. Oomoto, Kameoka, 1965. 62 p. 21 × 15 cm.*

"Kvinteto", verkeroj de kvin fondintoj kaj gvidantoj de Oomoto, estas miksaĵo de teologio, rakontoj pri mistikaj travivaĵoj, drama kaj rakonta fikcio simbola, kaj persvad-artikoloj de metafiziko, etiko, sociologio, kaj politiko. Ni legas jen ke en ĉiu vivaĵo troviĝas ero de

Dio, jen ke la suno neniam estingiĝos, jen ke ni devas introspekte reformigi niajn internojn, jen ke junaĝa geedziĝo estas farinda, jen ke almozuoj povas opinii sin pli feliĉaj ol ni opinias ilin, jen ke tero kaj terkulturada sperto estas bazo de bonmoralaj homoj. Ĉu tiu nekutima kombiniĝo de tre diversaj fakoj en unu (lingve kaj teknike belan) libreton montras, ke Oomoto estas ne simple religio kiel tiuj de la Okcidento, sed ĉio-ampleksa vivmaniero?

Jonathan Pool (Usono)

La espero kaj La tagiĝo, kantas ĥorgrupo Nagoja; **La amata voĉo de d-ro H. Jagi, kun voĉo de d-ro I. Arata; Impresoj per Esperanta vojaĝo**. Tri gramofondiskoj flekseblaj, 33 t/m 17 cm. Eld. Amo-Akademio, Kozoji, Japanujo, 1963-4. Po 1,50 gld. (6 st).*

Turniĝas la unua sondisko kaj sonas en mia hejmo la solena kaj majesta melodio de "La espero", perfekte kantata de Nagoja ĥorgrupo. La melodio kvazaŭ naĝas en la aero, ravante mian koron.

La dua disko rememorigas al mi Sofion — la renkontiĝon kaj mallongan, sed neniam forgeblan konversacion kun nia Jagi. Vere amata estas por mi, kaj por la tuta esperantistaro, lia voĉo. Same, estis agrable aŭdi la voĉon de d-ro Arata, elstara japana esperantisto.

Kaj fine, la tria. Interesa estas la reciproka intervjuo de s-ro Ito kaj s-ino Worcester pri ilia sperto en ĉirkaŭmondaj vojaĝoj per Esperanto. Ilia sperto montras la veran neŭtralecon kaj internaciecon de nia movado. Teknike, la diskoj estas bonege produktitaj. Belaspektas la kartonaj kovertoj.

Petro Poliŝĉuk (Taŝkent)

RECENZOJ

majo 1965
esperanto

Mekanikaj terminoj (represo de la indekso el "Mekanismo"), de K. OSSAKA kaj S. TAKATA. Terminoj japanaj, anglaj kaj esperantaj, ordigitaj laŭ japana lingvo. Eld. 1963. 16 p. 21 x 15 cm. Ricevebla de S-ro K. Ossaka, Senzoku 1447, Meguro-ku, Tokio.

Rilate japanan lingvon mi estas analfabeta, kaj tial miaj vortoj temas pri anglaj kaj esperantaj esprimoj.

La 14-paĝa indekso, apartenanta al 250-paĝa libro, prezentas fakvortojn sendifinajn. Terminoj, tre diversaj, indikas ke la verko mem vaste pritraktas la temon, "Mekanismo", laŭ teorio kaj praktiko. Aperas, kompreneble, neologismoj kies enkonduko eble ne kontentigos ĉiun, ekzemple, lemniscoid — lemniskoido. Malpli kompreneble, enŝovis sin du germanlingvaj terminoj anstataŭ anglaj. Plejparte la dulingvaj terminoj akordiĝas, tamen montriĝas laŭvortaj tradukoj, ekzemple, Seal type = tipo Sigelo.

Estas menciitaj maŝinoj por teksti, presi, ŝtonrompi, ktp., kun funkciado simpla aŭ male. Tro da misliterumoj; la anglaj superas kvalore la esperantajn.

K. McLennan (Britujo)

ricevitaj eldonadoj

Vortaro E-mongola kaj mongola-Ea, de prof. d-ro Rinĉen. Eld. Scienca Akademio de Mongola Popola Respubliko, 1964. 206 p. 20 x 14 cm.

Tri oraj haroj de l' diablo, kaj 2 aliaj fabeloj de la fratoj Grimm. El la germana tr. Kabe. Eld. Pola E-Asocio, Krakovo, 1964. 39 p., 17 x 12 cm., il. 0,75 gld. (3 st.)*

Bern-Loetschberg-Simplon. Eld. BLS, Genfergasse 11, Bern, Svislando. Senpaga fervojturisma prospekto.

La libro de teo, de Okakura kakuzo. El la angla tr. T. Nakamura. Eld. KOSMO, Osaka, 1965. 132 p. 18 x 13 cm., cumugie bd. 9,— gld.*

Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu por oponiani komunan malamikon. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 359 p. 18 x 13 cm. Kuna eldono de sep artikoloj jam unuope aperintaj.*

Reunio, insulo de la hinda oceano, de André Grondin. Eld. la aŭtoro, 1963. 6 p. 21 x 14 cm.

Gramatiko, ekzercaro kaj historio de Esperanto, de Anakreon Stamatidis. Nova eld. Ateno, 1964. 160 p. 24 x 16 cm.*

Nova vortaro Esperanto-korea. Eld. Korea E-Asocio, Pjengjang, Norda Koreujo, 1964. 349 p. 13 x 9 cm.*

Základy medzinárodného jazyka Esperanto de Vladimír Gazda. Eld. E-Rondeto en Martin, Ĉeĥoslovakujo, 1963. 47 p. 21 x 15 cm. Slovaka lernolibro.*

Lando ĉirkaŭ Vieno. Malsupra Aŭstrio. Eld. Landesfremdenverkehrsamt, Wien I, Heiden-schuss 2. Nova kolora prospekto.

Novi Sad. Eld. Turista Asocio, fortikaĵo Petrovaradin, Novi Sad, Jugoslavio, 1965. Senpaga prospekto kun esperanta aldono.

Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto, de Pol Denoel. Eld. Sonorilo, Bruĝo, 1965. Nova eldono, 93 p. 21 x 14 cm., il., bd. 4,35 (17,40).*

Kion vi faras? Ekzercaro por junaj E-lernantoj. Eld. Faux, Britujo, 1965. 28 p. 17 x 11 cm., il., mult. 1,— gld. (4 st.)*


La belaspekta libreto entenas 325 verbojn en grupoj, kiuj esprimas tion, kion homoj kaj bestoj faras. Sub titoloj (mi iras — ili flugas — ili naĝas — mi dormas — en la kuirejo — sur la farmbieno ktp) oni trovas la koncernajn verbojn. Ne ĉiuj titoloj esprimas la enhavon, ekzemple sub "Mi kuŝas" troviĝas nur malmultaj verboj por "kuŝi", sed multaj por "sidi". Facilaj propozicioj (La buĉisto buĉis la bovinon, la indiano padelas la kanoton per padelilo, la maristo remas en remboato per remiloj) helpas la enmemorigon.

Idetoj. Serio "Legu kaj lernu" n-ro 2. Eld. Faux, Britujo, 1965. 24 p. 17 x 11 cm., il., mult. 0,75 gld. (3 st.)*

La dua libro de la serio nomiĝas "Idetoj", tio estas malgrandaj infanoj de bestoj (ĉevalo-ĉevalido-ĉevaleto-ĉevalitido-ĉevalideto). Oni legas en la libreto pri multaj strangaj infanoj de bestoj kaj birdoj. Belaj muziknotaj lulkan-toj kaj interesa rakonto pri ursido riĉigas la enhavon. La libreto bone servas la instruadon de Esperanto por infanoj.

Andreo Gauder (Hungarujo)

H.C. ANDERSEN



LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERJEŝTRO
KAJ DU ALIAJ FABELOJ

numraj kaj sagaj fabeloj por
plenkreskuloj. Luksa libro en
granda formato kun multaj ko-
loraj ilustraĵoj.

Prezu nur 30 steloj.

Eldonejo Koko - Kolby Kaas



Danlando

Petu la senpagan Koko-nevun.

Supra Aŭstrio: Salzkammergut. Eld. Ober-österreichisches Landesfremdenverkehrsamt, Linz/Donau, Hauptplatz 9. Kolora senpaga prospekto.

El la historio de la Skania distrikto (de Sveda E-Federacio) 1935-1965, de Gösta Henriksson. Eld. SEF, Malmö 1965. 32 p. 22 x 17 cm., mult.

Aŭtodidakta lernolibro de l' Esperanto, de prof. d-ro Rinĉen. Eld. Scienca Akademio de Mongola Popola Respubliko, 1964. 120 p. 20 x 15.

LAŬLANDE

Bulgarujo

● En Sofio triopo de la Bulgara E-Teatro (Belka Beleva, Anani Anev kaj Georgi Kerelezov) prezentis antaŭ kelkaj centoj da spektantoj la komedion de Ĉeĥov "Edziĝpropono", luditan ankaŭ en Hago pasintjare.

Ĉeĥoslovakio

● En gravaj ĵurnaloj "Práce" kaj "Rudé Právo" (1 000 000 ekz., organo de la ĈKP) aperis lastatempe favoraj artikoloj pri Eo.

Danlando

● La 24-an de marto la Dana Radio elsendis en vfrina programo intervjuon pri Esperanto kun pola studento Andreo Grzebowski kaj kun anoj de la klubo en Lyngby.

Francujo

● El la lerneja agado de s-ro Pierre Delaire rezultis deviga kurso por 54 unuajaraj lernantinoj de privata komerca lernejo. La kurso daŭros ankaŭ ĝis pli altaj gradoj, tiel ke post 3 jaroj la tuta studentaro ricevos devigajn lecionojn.

Hungarujo

● La 4-a Somera Esperanto-Universitato de Hungara E-Asocio (Gyula 4-9 julio), krom diversaj distraj eroj enhavos prelegojn de Baghy kaj Kalocsay, kaj aliajn pri aŭstra, ĉeĥa, hungara kaj pola kulturoj. Informas HEA.

Israelo

● Oficiala kurso komenciĝis en teknika altlernejo en Haifa. Gvidas por 40 gestudentoj s-ro Moshe Savir. Jam formiĝis ankaŭ studenta E-grupo el diversnaciaj lernantoj, kiu invitas korespondon per la adreso: E-grupo, Student Union, Tekh'nion, Haifa.

Nederlando

● Nun, kiam estas sisteme ordigataj la 3000 volumoj en la esperanta fako de la Universitata Biblioteko de Amsterdam, cele al oficiala eldono de detala, science kompilita katalogo, la Biblioteko speciale invitas donacojn de libroj kaj periodaĵoj, por ke la katalogo, kiam ĝi aperos, donu maksimume kompletan bildon pri la esperanta literaturo. Proponojn bv. direkti al: Esperanto-fako, Universitata Biblioteko, Singel 423, Amsterdam (C).

Sovetunio

● Kiam fondiĝis antaŭ 6 jaroj la Verkista Unuiĝo de la Rusa Federo, ĝiaj verkistoj uzis 48 lingvojn. Nun la nombro altiĝis ĝis 56 per diversaj regionaj lingvoj, kiuj pli frue ne ekzistis en skriba formo.

(Laŭ "Moscow News")

Svedujo

● La E-Klubo de Ystad aranĝis lotumon de senpaga vojaĝo al la 50-a UK en Tokio. Kondiĉoj por partopreno estis: aniĝo al E-kurso, membriĝo al la klubo, kaj sufiĉa parola scipovo de la lingvo. La loka gazetaro multe interesiĝis. Gajnis s-ro Axel Östberg, fervojisto.

LAŬFAKE

Literaturo

● Ankaŭ ĉi-jare oni aljuĝos la premion "Comella-Bassols" al la plej bona gaja rakonto en Esperanto. Konkursajoj (po 2-3000 vortoj) estas akceptataj ĝis 31 aŭgusto. Vidu la regularon en "Esperanto" junio 1964, p. 115, aŭ petu detalojn de la sekretario, s-ro Francisc Vilà, Laŭria 12-14, Barcelona-10, Hispanujo. La premio valoras 2000 pes. (400 st.).

● "El japana literaturo", antologieto de japana prozo el la jaroj 1868-1945, aperos baldaŭ. Eldonos Japana E-Instituto. Ĝi enhavos 19 rakontojn kaj 2 dramojn.

Mondcivitanoj

● D-ro E. J. Goerlich (Postamt 70, Postfach 70, Vieno, Aŭstrujo) transprenis la Centron Esperantistan de la Internacia Registrolibro de la civitanoj de la mondo.

mallongaj novaĵoj


Arte konstruita Esperanto-stando en la foiro de Nice, Francujo, 4-15 marto



OOMOTO PROPONAS ALTAJN PREMIOJN

Poezia konkurso kun premioj de ĝis 1000,—gld. (4000 steloj) estas aranĝita okaze de la Internacia Festivalo de Oomoto, kiu okazos en Kameoka post la Universala Kongreso en Tokio. Temo, stilo kaj formo de la poeziaĵoj estas laŭ elekto de la konkursantoj. La solaj kondiĉoj por partopreno estas, unue, ke la verkoj estu en Esperanto, kaj, due, ke ili atingu la organizan komitaton, ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo, antaŭ la fino de junio 1965. La unua premio konsistas el 1000 gld., la dua el 500, la tria el 200, kaj 10 ceteraj premioj el po 50 gld. Krome, ĉiu konkursanto senescepte ricevos japanan memoraĵon.

**esperanto
majo 1965**



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando.**

NEFERMITA LETERO AL ĈIUJ PLENAĜAJ ESPERANTISTOJ

Karaj kaj estimataj Gelegantoj,

Sendube vi lastatempe ofte renkontis en la Esperanta gazetaro raportojn pri la aktiveco de TEJO kaj de ĝiaj 19 Landaj Sekcioj kaj tial scias, ke la junulara sekcio de UEA ne kontentiĝis per la sukcesaj rezultoj de la Jaro de la Junularo 1963, sed ke ĝi daŭre plivastigas sian agadon sur multaj kampoj. Energie ĝi partoprenas en la kampanjo okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, ekprenis intensajn kontaktojn al multaj gravaj internaciaj junularaj organizaĵoj, nun vigle preparas NEO-seminaron pri lingvaj problemoj kaj komencis en la kadro de novaj komisionoj agadon sur la kampoj ekstereŭropa, afrika, lerneja ktp. Entute ŝajnas evidente, ke neniam antaŭe la junulara Esperanto-movado travivis tiel favoran evoluon aŭ troviĝis en tiel promesplena situacio kiel ĝuste nuntempe.

Sed... preskaŭ ĉiupaŝe ni dolore konscias, ke io grava malhelpas eĉ pli impetan agadon – devigas nin ofte limigi la aktivecon tie, kie ĝi nepre necesus – entute multfoje bremsas la laboron de TEJO... Tiu ĉi granda obstaklo estas (tion vi verŝajne jam divenis) la financa nekapableco – problemoj, kiu per atentigoj, ke temas pri ĝenerala karakterizaĵo de la movado, tute ne perdas sian eksterordinaran tiklecon kaj ja antaŭ ĉio posedas aktualecon por la junularo esperantista, kiu laŭ ĉies opinio estas "nia espero pri la estonteco". Nur kiam la financa stato de TEJO plistabiliĝis, la estraro de TEJO kaj ĉiuj ĝiaj sindonemaj kunlaborantoj povos realigi multajn planojn, grandiozajn projektojn aŭ bonajn ideojn, kiuj momente tre bedaŭrinde devas kuŝi en tirkesto kaj tie minacas polvokovriĝi – simple pro manko de mono!

Do, se vi vere fidus, ke la junularo estas "nia espero", pruvu tion, ni tre petas, per konkreta helpo, ĉar sincere dirite tiun ĉi TEJO plej urĝe bezonas por venki sian financon krizon. Ne pensu, ke ni "almazpetas", sed konsciu, ke finfine de sukcesa laboro de TEJO dependas, ĉu Esperanton praktikos ankoraŭ la venontaj generacioj aŭ ĉu la idealo, por kiu vi ofereme agis dum via tuta esperantista vivo, iom post iom pereos!

La estraro de TEJO decidis krei specialan membrokategorion por tiuj pli aĝaj esperantistoj, kiuj pretas esti veraj amikoj de la Esperanto-junularo kaj subteni la agadon de TEJO, kaj ĝi alvokas ĉiujn pli aĝajn ol 25jara fariĝi **Patrona Membro de TEJO**:

- * Patrona Membro A pagas jare 16 ned. gld. (64 stelojn) kaj ricevas (a) la revuon "Kontakto" kaj (b) materialojn pri la agado de TEJO.
- * Patrona Membro B pagas jare 5 ned. gld. (20 stelojn) kaj ricevas laŭ peto regule informojn pri la aktiveco de TEJO.

Ĉi-loke ni deziras ankaŭ memorigi al vi la Fondajon Junulara Gazeto (FJG) – oficiala fondaĵo de UEA, per kiu vi povas subteni speciale la revuon "Kontakto". Krom aliĝo kiel Patrona Membro vi do kompreneble ankaŭ povos kontribui al FJG.

La nomoj de ĉiuj Patronaj Membroj estos listigitaj en "La Juna Vivo", kaj donacoj al FJG estos – kiel ĝis nun – registritaj sub la oficialaj komunikoj de la CO de UEA.

Bonvolu ne forgesi, ke ĉiuj aktivuloj de TEJO laboras sub ofte ekstreme malfavoraj personaj cirkonstancoj, samtempe studante por sia estonta profesio kaj tamen uzante grandan parton de sia libertempo – se ne eĉ sian tutan! – por Esperanto. Ĉu do estas tro, se ni petas vin grandanime subteni la entuziasmon de la junularo? Per via aliĝo kiel Patrona Membro, per viaj donacoj al la Fondaĵo Junulara Gazeto, vi garantias rekte la pluekzistadon de tiu junulara energio favore al pliaj sukcesoj de la Internacia Lingvo!

Estu certa, ke ni alte aprezas ĉiam ĉian kaj ĉies helpon!

Kun tre sincera antaŭdanko, multaj bondeziroj por via persona bonfarto kaj koraj salutoj, via

Estraro de TEJO

Ivo Osibov, Simeon Simeonov, Humphrey Tonkin, D-ro Carlo Minnaja, Ulrich Lins, Marek Pietrzak, Yoshimi Umeda, Svoboda Zlatnar.

Kiel pagi al TEJO

- * Al Universala Esperanto-Asocio pere de (a) poŝtĉekkonto 378964, (b) Banko R. Mees en Zoonen, Rotterdam.
- * Al landaj ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA.
- * Al la kasisto de TEJO, Ulrich Lins, 5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo (poŝtĉekkonto 138119 Köln)
- * Al la ceteraj estraranoj de TEJO.

Pagante bv. ĉiam aparte indiki la celon de via pago!

SUKCESO POR SEL

La lastan tagon de 1964 alvenis letero ĉe s-ro J. van Gulck, prezidanto de la "Skolta Esperantista Ligo" SEL de 1952 ĝis 1965. La leteron sendis Maj. Gen. D. C. Spry, direktoro de la Monda Skolta Oficejo. Ĝi tekstis: "Je la kunveno de la Monda Komitato en Luksemburgo en septembro 1964, la demando pri Esperanto inter skoltoj estis pritraktita. La Komitato pritraktis tiun demandon lastfoje en 1934, kaj rezoluciis jene: "La Komitato ne aprobas studon de Esperanto inter skoltoj, konsiderante tion de malgranda praktika valoro".

Je la nova kunveno, la Komitato konsentis pri jena eldiro, kiun mi kun ĝojo transsendas

al vi: "Esperanto... pruvis sian utilon en multaj sferoj kaj en kelkaj Skoltaj Asocioj estas permesata por la Interpretista Insigno. La Komitato decidas nuligi la rezolucion de 1934, sed fari neniun alian paŝon."

Kvankam tio ne estas granda progreso, mi kredas, ke vi samopinias ke tio estas – laŭ via vidpunkto – paŝo en la bona direkto. Sincere via, D. C. Spry."

La afero certe meritas gratulon al SEL kaj CED! Parenteze, skoltaj legantoj, ĉu vi jam estas membro de SEL?

Informiĝu ĉe red. LJV!

Franclingva, ilustrita raporto pri la **20-a IJK** estas eldonita kun la celo prezenti ĝin al junulaj instancoj aŭ organizoj, informe pri la IJK, TEJO kaj Esperanto.

Restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj. Kiu deziras ĝin utiligi informcele, skribu al 20-a IJK, ĉe red. LJV., indikante kiel li/ŝi intencas utiligi la libreton.

De la **kongreslibro** pri la IJK estas ankoraŭ ekzempleroj senpage haveblaj, ekz. por anoj de Esperantokursoj kiel ekzercmaterialo, por ekspozicioj, ktp. Petu al 20-a IJK, ĉe red. LJV.

Aŭstria Esperanto-Junularo invitas al la Internacia Junulara Renkonto (IJR), de la 4-a ĝis la 7-a de junio 1965 (Pentekosto), en la ĉefurbo de la aŭstria liglando Karintio, Klagenfurt.

La programo, startante vendrede, 4-6, vespere enhavos prelegojn sub la temo: "La Jaro de Internacia Kunlaboro kaj la Lingva Diskriminacio en la Mondo", akcepton ĉe la urbestro de Klagenfurt, gazetaran konferencon, malfermon de Esperanto-ekspozicio, ŝipekskurson sur la lagon de Wörth, banadon en tiu lago, pentekostan promenadon, du amuzajn vesperojn. Je la pentekosta dimanĉo okazos Esperanto-Diservo.

La kotizo estas ekstreme malalta: 95.- aŭstr. ŝil. resp. 53 stel. kaj enhavas tri tranoktojn plus matenmanĝoj, la ŝipekskurson kaj la IJR-Kotizon. Krome oni povas malmultekoste manĝi en gastejo.

Aliĝojn akceptas nur kune kun la pago de la kotizo: Peter A. Peltzer, kasisto de AEJ, A 8 Graz 6, Klosterwiesgasse 79. Ni atendas bonvolan baldaŭan aliĝon!

La fondaĵo Anne Frank ĵus eldonis en la angla lingvo kaj en Esperanto sian informbultenon de printempo 1965. Interesiĝantoj petu ĝin senpage de: Domo A. F., Prinsengracht 263, Amsterdam-C.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, Paris 16, Francujo. Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

Pola Radio en Varsovio ĉiam elsendas ĉiutage en Esperanto de 15.30 ĝis 16.00 (GMT), sed nun per la jenaj ondlongoj: 200 m. (1502 kcs), 50.42 m. (5950 kcs), 50.04 m. (5995 kcs), 48.90 m. (6135 kcs), 42.11 m. (7125 kcs), 41.99 m. (7145 kcs), 41.27 m. (7270 kcs), 41.18 m. (7285 kcs).

Okaze de la 18-a Biciklista Pac-konkuro, Pola Radio organizas grandan sportan konkurson. Nepre tuj petu la regularon, ĉar limdato por sendo de respondoj estas la 15-a de Majo.

Radio Roma. 4-V, Tra la literaturo; 7-V, Italaj belartaj urboj: Trapani; 11-V, Novaĵoj el Italujo; 14-V, La tago de bonvolo; 18-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-V, Italaj verkistoj: Edmondo De-Amicis; 25-V, Leterkesto; 28-V, Italaj mortintaj urboj: Sibari; 1-VI, Tra la literaturo; 4-VI, Italaj famaj pentristoj: Tiziano; 8-VI, Novaĵoj el Italujo; 11-VI, Italaj belartaj urboj: Assisi; 15-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-VI, Italaj komediverkistoj: Carlo Goldoni; 22-VI, Leterkesto; 25-VI, Italaj turismaj urboj: Rimini; 29-VI, Kristana mondo. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj dum la venontaj monatoj:

1. *Daŭrigi kaj intensigi* la kolektadon de subskriboj por la Propono al U.N., kaj en la nomo de la grupo inviti la urbestron subskribi ĝin.

2. *Aranĝi debaton* (memkompreneble en Esperanto) pri iu aktuale diskutata temo el la internacia aŭ nacia vivo.

3. *Proponi aranĝon de E-kurso* al iu junulara organizaĵo, se troviĝas taŭga instruanto. (Se vi opinias, ke nun ne estas la "kurso sezono", unue demandu al vi, ĉu tiu ne estas nur preteksto por nenion entrepreni.)

4. *Dediĉi unu kunvenon al kritika diskuto* pri la esperanta gazetaro. Kompari la enhavon de la diversaj gazetoj kun la roloj, kiujn ili devus plenumi. Komune decidi pri klubaj abonoj. (Vidu la ĝisdatan liston de gazetoj, kun koncernaj adresoj, en la Jarlibro 1965/I, p. 175).

ARSÈNE PERRIN

nekrologoj

Forpasis la 6-an de marto, 81-jara, en Bobigny, Francujo, s-ro Arsène Perrin, delonga membro de UEA kaj Delegito dum multaj jaroj.

BERNARDINO ASENJO ESPINAR

La 17-an de februaro mortis en Granada, Hispanujo, s-ro Bernardino Asenjo-Espinar, delonga UEA-delegito. Li estis 63-jara.

majo 1965
esperanto



50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Tokio, 31.VII - 7.VIII, 1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio.

ISU

La 18-a sesio de la Internacia Somera Universitato enhavos, sub la rektoreco de prof. Hidemiti Oka, prelegojn de prof. F. Egami (Japanujo), prof. C. Støp-Bowitz (Norvegujo), prof. I. Lapenna (Britujo), prof. Masao Suzuki (Japanujo), d-ro R. Lewin (Usono), s-ro H. Tonkin (Usono), prof. S. Kawamura (Japanujo), prof. Naomiti Oka (Japanujo) kaj s-ro Tibor Sekelj (Jugoslavio).

Karavanoj

Grupo da francaj kongresanoj aranĝas vojaĝon al Tokio tra Moskvo kaj Siberio, kun posta rondvojaĝo tra la plej allogaj partoj de Japanujo, post la Kongreso. La forveturo el Parizo kaj Bruselo okazos dimanĉon la 25-an julio, la alveno al Tokio vendredon la 30-an. Por la reveno: foriro el Jokohama sabaton la 21-an de aŭgusto, alveno al Bruselo kaj Parizo vendredon la 27-an. La vojaĝo okazos per aviadilo de Parizo kaj Bruselo al Ĥabarovsk, per transsiberia fervojo de Ĥabarovsk al Naĥodka, per ŝipo de Naĥodka al Jokohama. Rondvojaĝo en Japanujo per aŭtobuso, ŝipo kaj vagonaro. En Sovetunio, vizito al Moskvo, Irkutsk kaj Ĥabarovsk; en Japanujo al Hiroŝima, insulo Mijajima, Fukuoka, Beppu, Interna Maro, Kobe, Osaka, Nikko, Jokohama ktp. Prezo: 4350 francaj frankoj (ĉ. 12 400 steloj), inkluzive de ĉio, escepte de la restado en Tokio kaj Kioto dum la UK kaj postkongreso. Detale informas: s-ro Henri Dabezies, ave. Debidour 2, Paris 19, Francujo. Kongresanoj el ĉiuj landoj povas aliĝi al tiu karavano.

La aviadila karavano de UEA estas nun denove tute plena; krome ekzistas atendolisto pro la ebleco, ke ankoraŭ iu malmendos sian lokon pro malsano aŭ simile. Ĉiuj detaloj de la flugo estas nun definitive fiksitaj.

Aliaj karavanoj veturos al Tokio el Svedujo, Italujo, Aŭstralio kaj, verŝajne, Usono.

Postkongresaj aranĝoj

Aliĝantoj al la Internacia Festivalo de Oomoto kaj al la IJK de TEJO en Oocu povas pagi siajn kotizojn pere de UEA, laŭ la kutima maniero. Detala programo estas fiksita por la ekskurso al Hiroŝima (12-15 aŭgusto). Informas pri ĝi P.O. Kesto 24, Hiroŝima-Niŝi. Statistiko (je 6 aprilo 65)

Alĝ. 1, Arg. 4, Aŭstral. 29, Aŭstrujo 8, Bahamoj 2, Belg. 7, Bra. 9, Bri. 43, Bul. 11, CAR 1, ĈSR 1, Dan. 19, Finn. 6, Fr. 88, Ganao 1, Ger. 43, Hind. 1, His. 7, Hong. 2, Hung. 8, Irl. 1, Isr. 2, It. 30, Jap. 776, Jug. 10, Kameruno 2, Kanado 6, Mar. 2, Meks. 2, Mon. 2, Ned. 32, Nor. 11, N.Z. 16, Pol. 30, Por. 1, Rum. 1, Sov. 1, Sved. 53, Svis. 12, Urug. 4, UAR 1, Us. 54, Ven. 3.

Entute: 1343 el 43 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

MEMORIGA KALENDARO

Majo

22-28 IFEF-Kongreso, Hamar, Norvegujo

Junio

4-7 Int. Junulara Renkonto, Klagenfurt
5-7 Belga kongreso, Ostende
5-7 Franca Kong., Le Havre
5-7 Germana Kongreso, Düsseldorf
5-12 Int. Junulara Kunveno, Düsseldorf
19-22 Skandinavia Kongreso en Oslo
30 Limdato aliĝo UK Tokio

Julio

1 Limdato foto-konkurso 1965 (UEA)
4-10 Int. Ferio-Semajno Novi Sad, Jug.
4 Sezono Grésillon komenciĝas
9-10 Inaŭguro E-Monumento Linz
11-17 Eŭropa E-Konferenco, Vieno
18-14/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥos.
18-25 Int. Geografia Semajno, Jelenia Góra
18-25 Int. FERIAJ Kursoj, Helsingør, Dan.
20-24 Hispana Kongreso, Palencia
23-26 ELNA-Kongreso, Portland, Oregon
24-31 KELI-kongreso, Bolder, Svislando
25-31 Int. Junulara Konferenco, Amsterdam
25-1/8 STELO-semajno, Balaton, Hungarujo
31-7/8 50-a UK, Tokio
31-7/8 Int. Ferio-Semajno Zwolle, Ned.

Aŭgusto

1-8 SAT-Kongreso, Karlsruhe, Germ.
8-13 Postkongresa ekskurso, Kansai-dist.
8-15 IJK de TEJO, Oocu, Japanujo
8-16 Int. Ferio-Semajno Krommenie, Ned.
8-20 Int. renkonto de LIBE, Gwatt, Svis.
10-20 Int. Pedagogia E-Tendaro, Szeged, Hung.
13-15 Int. Festivalo de Oomoto, Kameoka
13-20 Dua Konf. de Lernejoj, Bishop's Stortford
22-28 Int. Ferio-Semajno Caslano, Svis.

Septembro

6-10 Int. Jun. Konf. pri lingvaj problemoj, Ljubljana, Jugoslavio (TEJO)
12 Sezono Grésillon finiĝas
24-26 Nederlanda Jub. Kongreso, Amersfoort

Bonvenon al Svedlando !

Internacia kurso surmonte en belega regiono en sudokcidenta Svedlando 10-21 julio. Temo: Monda socio estas kreata.

- Paclaboro kaj pacesploro, nova dana ekonomia sistemo k.t.p.
- Prelegoj, diskutoj, ekskursoj en amika atmosfero. Petu pro-spekton:

**Feria hejmo "La Kosmo",
VARNHEM, Svedlando.**

NOVA PERANTO POR HINDUJO

S-ro Seoti Prakash, B 15/10 Ramesh Nagar,
NEW DELHI-15, Hindujo.

DELEGITOJ

Alĝerio

Alger 1.000.000.

D: S-ro G. A. Dumont, kalkulisto, Poste
Restante.

Aŭstralio

Fitzroy (Victoria).

FD (SOS-aŭto-servo): S-ro I. Grahovac, labo-
risto, 144 Brunswick St.

Melbourne (Vic.)

FD (SOS-aŭto-servo): la FD (Kino).

FD (Turismo): S-ro J. Ryding, ing., 5 Edward
St., Sandringham S. 8; tel. (hejme) 98 3236,
(oficejo) 98 1870.

Moree (N.S.W.) 7.360.

D: S-ro E. W. Woodruff, okulsciencisto, The
Max Centre, P.O. Box 288; tel. 753.

FD (Okulscienco): la D.

Tamborine Mount (Queensland) 700.

FD (Turismo): F-ino A. Curtis, dommastrino,
North Tamborine.

Aŭstrujo

Graz FD (Astronomio): la VD.

FD (SOS-aŭto-servo): la FD (Instruado).

Linz D: S-ro F. Tschom, dipl. ing.-fervoĵisto,
Wallnerstr. 14; tel. 26811-335.

Belgujo

Ampsin (Liège) 3.500.

D: S-ro A. Landenne, Chaussée de Liège 111.

Antwerpen FD (Elektrotekniko): S-ro R. De
Schepper, inĝeniero, Doornstr. 22, Wilrijk;
tel. (03) 38.45.14.

Mechelen VD: S-ro L. Van Der Zijp, aŭtobus-
kondukisto, 25 Gustaaf Van Hoeystr.

Brazilo

Barra do Pirai D & FD: vakas.

Fortaleza VD: S-ro J. Dutra Mendes, ŝtat-
oficisto, Rua Tijipió 96 (Praia de Iracema);
tel. 1-0416.

Itabuna D: vakas.

Pontes e Lacerda (Mato Grosso) 500.

D: S-ro H. H. Ubat, misiisto evangelia, C.P.
33, Câceres.

FD (Evangelia Kristanismo): la D.

Rio de Janeiro FD (Filozofio: Jogo): S-ro L.
Oliveira de Souza, profesoro, Rua Dois de
Dezembro, 118 ap. 502 (Catete).

Salvador FD (Radioamatorismo): S-ro N. Dutra
d'Amorim, civila inĝeniero, C.P. 945; tel.
36602.

São Lourenço VD: S-ro F. Guinesi, muzikisto,
Rua Primeiro de Abril 82.

FD (Hoteloj): S-ro A. Machado de Souza,
komercisto, Rua Cel. José Justino No. 787
(Centro); tel. 5.

FD (Numismatiko): la D.

Teresina (Piauí) 145.000.

D: S-ro A. de Padua Soares, bankoficisto,
Rua Lisandro Nogueira 964.

Britujo

Altrincham (Cheshire) 41.300.

D: S-ro A. J. Leather, gas-inĝeniero, 67
Ridgeway Road, Timperley; tel. Ringway
3505.

Barrow-in-Furness (Lancs.) 64.000.

D: F-ino M. J. Hockey, instruistino, 82 Friars
Lane; tel. Barrow 1784.

Bebington (Cheshire) 50.000.

D: S-ro J. A. Halliday, sindikata funkciulo,
4 Brereton Ave.; tel. Rockferry 5162.

Bolton (Lancs.) 176.000.

D: S-ro H. Yates, laboristo, 379 Ainsworth
Road, Radcliffe, Manchester.

Darwen (Lancs.) 29.600.

D: S-ro J. S. Gavan, em. fervojisto, 55 Green-
bank Terrace, Lower Darwen, Blackburn.

Denton D: la FD (Rotario)

FD (SOS-aŭto-servo): la FD (Rotario)

Kirk Michael (Isle of Man) 48.000.

D: S-ro C. Steel, em. ŝtatoficisto, "Nova
Espero", Cannan Ave.; tel. 248.

Bulgarujo

Burgas 130.000.

FD (Fiŝ-kaptado & -konservado): S-ro K. N.
Limonov, teknologo, str. Asen Zlatarov 28;
tel. 49-16.

Dimitrovgrad FD (Instruado): s-ro V. Vâlčev,
em. instruisto, Buzluĝa 18.

Jambol FD (Jurnalismo): la D.

FD (Komerco): S-ro D. Hazmonaj, komercisto,
str. Sredna Gora 3.

Kolarovgrad D: la FD (Jurnalismo).

FD (Turismo): la FD (Instruado).

Razgrad 30.000.

FD (SOS-aŭto-servo): S-ro N. M. Petâr, ofi-
cisto, Petâr Beron 28.

Sofia FD (Esperantologio): la FD (Instruado
de E.).

FD (Ĥemio: plasto): S-ro G. D. Dokov,
teknologo, Jordan Kiskinov 35; tel. 4-06-70;
4-01-10.

FD (Kooperativismo): vakas.

FD (Sporto): la FD (Turismo).

Stara Zagora FD (Kemio): la D.

Zimnica 3000.

FD (Mekaniko): S-ro S. K. Ivanov, muntisto,
Zimnica Jambolsko.

Ĉeĥoslovakio

Brno FD (Edukado): la D.

Lanžhot FD (Edukado): la D.

Náchod-Dolní Radechová FD (Edukado): la D.

Olomouc (Morava) 77.000.

D: S-ino Marie Břehová, apoteka laborantino,
Velká Bystřice 577 okres Olomouc; tel.
(laborejo) 4912.

Opava FD (Ekonomio): la D.

Ostrava D: S-ro K. Škrobák, fervojisto, Ostrava
I, Jindřichová 42.

FD (Fervojoj): la D.

Poděbrady FD (Edukado): S-ro J. Chvosta, faka
instruisto, Engelsova 289.

Finnlando

Espoo VD: S-ro V. Penttilä; tel. (oficejo)
90-643490.

Joensuu D: vakas.

Jyväskylä D: vakas.

Kouvola (Kymenlääni) 20.000.

D: S-ro Y. Hiltunen, fervojisto, Sakaristontie
15. A. 2.

Säkylä (Turun ja Porin lääni) 5000.

D: S-ro P. Kilkku, kalkulisto, Lannen Sokeri,

oficiala informilo
n-ro 379, 1. apr. 1965

esperanto
majo 1965

Länsi-Säkylä.
Tikkakoski FD (SOS-aŭto-servo): la D.
Turku D: S-ro L. Vesamaa, ing., Uudenmaan-
 katu 4, D. 81; tel. 921-19 307.
 FD (Maŝin- kaj ŝipkonstruo): la D.
 FD (Turismo): vakas.

Francujo

Boulogne-Billancourt FD (Elektroniko): S-ro
 M. Feneyrol, elektronikisto, 26 bis Rue des
 Peupliers.

Le Havre

D: S-ro G. Mammaux, konstru-teknikisto,
 23 Rue Saint Michel; tel. (Hejmo) 42.54.41,
 (Oficejo) 48.89.81.

FD (Konstruado): la D.

Lormont (Gironde) 10.000.

FD (Instruado): S-ro M. Lavergne, instruisto,
 50, Quai Elisabeth Dupeyron.

Nice FD (Rotario): S-ro R. Fiquet, entrepren-
 nisto, 1, Place Garibaldi, Nice, Alpes Mari-
 times 06; tel. 85-39-81.

Norrent-Fontes FD (Turismo): la FD (Instru-
 ado).

Oulchy-le-Château D: vakas.

Saint Etienne D: vidu Le Chambon.

VD: F-ino C. Tissot, ekskomercistino, 2 Rue
 Camélinat.

FD (Medicino): vidu Le Chambon.

FD (Sociaj aferoj): S-ro J. Rival, em. oficisto,
 10 rue Clément Forissier.

Germanujo

8060 Dachau (Bayern) 30.000.

D: S-ro W. von der Ley, ing., Breslauer Str.
 97; tel. 08131-5735.

Elmshorn D: S-ro A. Heiden, oficisto, Kalten-
 weide 81.

FD (Fervojoj): S-ro H. Pietsch, fervojisto,
 Vosskuhlen 4.

FD (Turismo): la D.

Hamburg FD (Polico): la D.

FD (SOS-aŭto-servo): la antaŭa FD (Polico).

Hetzlinshofen D & FD (Filatelo): vakas.

Köln JD: S-ro U. Lins, studento, 5 Köln-
 Dellbrück, Gemarkenstr. 146; tel. 681095.

894 Memmingen (Bayern) 30.000.

D: S-ro H. Barmaneter, fervojisto, Hetzlin-
 shofen, 8941 Post Herbishofen ĉe Mem-
 mingen.

FD (Turismo): la D.

Westerland FD (Fungoj): la FD (Muziko).

Grekujo

Thessaloniki JD: F-ino D. Lukidu, studentino,
 Oreopulu n-ro 2, Tesaloniki-7.

FD (Fervojoj): S-ro K. Zañariadi, em. fervo-
 jisto, Parodo Gabriel Vasiliadi 4, Ksiro-
 krini; tel. 24060.

Hindujo

New Delhi D: la FD (Fervojoj).

FD (Filatelo): la FD (Fervojoj).

FD (Hindaj komercaĵoj, manlaboraĵoj): la
 FD (Fervojoj).

Hispanujo

Barcelona D: vakas.

El Arenal (Mallorca) 2.000.

FD (Religio: Bahaismo): D-ro C. R. Witt,
 dentkuracisto, Vernon Court, Calle Bosque.

Granada D: vakas.

Moyá FD (SOS-aŭto-servo): la D.

Tarragona 55.000.

JD: S-ro J. Serrano Subietas, studento, str.
 Mercería 7-3º.

(sekvo en la junia "Esperanto")

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Cantlon, s-ro W. C., Gisborne, Nov-Zelando.

Gilles, s-ro André, Beaune, Francujo.

Peterson, s-ino Cecilia, Downey, Usono.

Ritthaler, s-ro M., Hambach, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

260 Costa, s-ro Fr. Ferreira da, Filho; 261
 Pessoa, s-ro F. N. de V., Brazilo; 262 Goulding,
 s-ino E; 263 Sinclair, f-ino P. C., Britujo;
 264 Teukku, s-ro T., Finnlando; 265 Borel,
 s-ino; 266 Ploussu, s-ro A., Francujo; 267
 Romano-Joly, s-ro M., Kongo; 268 Bugge-
 Paulsen, kapt. R.; 269 Engen, s-ro Per, Norve-
 gujo; 270 Ek, s-ro Axel; 271 Eriksson, s-ro Axel,
 Svedujo; 272 Hedaeus-Eriksson, s-ino M.;
 273 Ljungberg, s-ino A.; 274 Olsson, f-ino
 Agda; 275 Pålsson, s-ro H.; 276 Snarberg,
 s-ro Jack; 277 Stenberg, s-ro B.; 278 Stridell,
 s-ro K.; 279 Turner, s-ro F., Svedujo; 280
 Chobanoff, d-ro S.; 281 Cole, Lt. John A.;
 282 Gerson, s-ino M. H., Usono.

DONACIOJ AL ĜENERALA KASO (GLD.)

Rentmeister, s-ro F. 2,75, Aŭstrujo; Cham-
 bers, s-ro J. W. 5,—, Britujo; Lemaire, s-ro R.
 23,55, Francujo; Hughes, s-ro A. 12,29, Usono.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Joliet, s-ro Leo 10,—, Rosenstengel, s-ino K.
 9,—, Germanujo; Arranz, d-ro P. 9,—, Martín,
 s-ro M. 16,68, Hispanujo; Majcenović, s-ro M.
 24,—, Jugoslavio; Steffering, f-ino W. 2,50,
 Vetter, s-ro R. 5,—, Nederlando; Persson, s-ro
 Anders 15,89, Svedujo; Joon, s-ro C. 4,50,
 Nederlando.

Sumo entute ricevita: 16 183,94 gld.

Sumo elspezita: 15 893,20 gld.

Saldo pozitiva: 290,74 gld.

FONDAĴO CANUTO

Tursi, d-ro N., Italujo: 1 J-MA.

Meywes, f-ino M., Nederlando: 1 MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn
 en landoj kun malforta valuto, omaĝe al la
 prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO

Dumarquez, s-ro A., Francujo: 3,55 gld.

Feneyrol, s-ro Maurice, Francujo: 142,85 gld.

FONDAĴO JUNULARA GAZETO

Tursi, d-ro Nestore, Italujo: 35,— gld.

Osibov, s-ro Ivo, Jugoslavio: 4,80 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
 ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,

Direktorino C.O.

Informa Servo de Kobe Esperanto-Asocio (88, 3-chome, Yamamoto-dori, Ikuta-ku, Kobe, Japanujo) urĝe bezonas freŝajn novaĵojn pri Esperanto ie ajn por la regula informado per gazetaro. Eldonantoj de turismaj prospektoj k.s. estas afable petataj sendi po 3 ekz. por transdoni al la ĉefaj gazetoj, ankoraŭ ne gajnitaj por nia afero. Kosto de afranko per aviadilo estos repagita, se indikite.

Scienca Pensado povas konduki al objektiva vivkoncepto, se ĝi traktas novajn ideojn. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

La urbo Bradford oficiale festos La Jaron de Internacia Kunlaboro la 20-an de junio. Sendu Il. Pk. por gratuli la urbestron kaj tiel montri la internaciecon de Esperanto. Adreso: Lia Moŝto "Lord Mayor", Town Hall, Bradford 1, Yorkshire, Anglujo.

Alvoko al Lernejoj. Kiel sia kontribuaĵo al la Jaro de Internacia Kunlaborado la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio volas aranĝi interŝanĝon de elmontraĵoj inter tutmondaj lernejoj. Oni bezonas fotojn, bildojn el revuoj aŭ koloraj kalendaroj k.c., poŝtkartojn, desegnojn, ĉiuj aranĝitaj laŭ temo: "Ni mem, nia lernejo, nia urbo, nia lando", kun priskribo verkita de la geinfanoj en simpla, klara Esperanto (kontrolita de instruisto pro tio ke la lingvo estu bona). Reciproke ni sendos tian materialon el niaj lernejoj. Bonvolu tuj aerpoŝte avizi nin se vi intencas partopreni, al: s-ro David McLeod, New Zealand Teachers' Esperanto Association, P.O. Box 181, Upper Hutt, Nov-Zelando.

200 gelernantoj komencantaj deziras korespondadi por perfektigi Esperanton. Ĉiuj havos garantiitajn respondojn. Skribu al Ginásio Lara Vilela — Niterói — Brazilo.

Franca Grupo novnaskita dezirus ricevi antaŭ la 15-a de majo multajn poŝtkartojn kaj amikajn salutojn el la tuta mondo por festi sian unuan datrevenon. Oni dankos per p.k. "Kresta Stelo" — Avenue Rabot — Crest (Drôme) Francujo.

Jugoslavion mi intencas viziti dum somero. Bonvolu sendi informojn pri la ĉefaj grupoj kaj vizitindaj lokoj. Mi estas fraŭlo 27-jara. Nepre respondos. L. Valles, Granvia 423, Barcelona 15, Hispanujo.

Vi kristana, nesupraĵa, juna virino kiu estas solega kaj serĉas iun por kiu vi volus vere ion signifi kaj kun kiu vi povus interŝanĝi pensojn pri la esencoj de la vivo, bonvolu skribi al 27-jara sveda viro. Ĉefaj intereso: lingvoj, serioza kaj popola muziko. Dancado, filmo, komercigita popularmuziko ne interesas min. S-ro Matz Landfors, c/o Eriksson, Norra Tjörngatan 6, Sundsvall, Svedujo.

Britaj virinoj kompatu min, skribu. Nek unu brita virino respondis al miaj antaŭaj anoncoj. Mia aĝo 43, domposedanto, S-ro Semaska, 6 New Street, Essington, Wolverhampton.

Kun akvariistoj deziras korespondi Nikolao

Kizem, Ratka Spanjolca 10, Zagreb, Jugoslavio

40 italaj universitataj gestudentoj, partoprenantaj unuagradan kurson, deziras korespondi tutmonde. Bonvolu adresi: Cruces-Esperanto, Via Roma 59, Cagliari, Italujo.

Interŝanĝas E-kongres-stampojn/fotojn 1905/1925. Deziras Tokio 1965. Intereso por dokumentkopioj el la tuta mondlingva movado (Volapük, Esperanto, Ido, Interlingue) E. Andereg-Gurtner, Horn am Bodensee/Svislando.

Uneskanoj Esperantistoj Tutmondaj: Ni urĝe petas vian helpon al Aŝiya Unesko, informante pri viaj efektivaj agadoj, konsiloj kaj sugestoj. Kompensota nepre respondo. Anticipan dankon! (Uneska Domo, 30, 1-chome, Okuyama-cho, Asiya, Hyogo-ken, Japanujo).

Internacian kongresatmosferon vi ĝuos Pentekoston 1965. Aliĝiloj haveblaj kaj por kvin respondkuponoj: 36 glumarkoj, bele afrankita unuatagkoverto kun esperantlingva poŝtstampo ĉe Germana Esperanto-Kongreso, Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Por miaj proks. 400 gelernantoj mi serĉas junajn ĉiulandajn gekorespondantojn: S-ro Pierre Delaire, 9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, Orléans (Loiret), Francujo.

Düsseldorf, la plej moderna urbo de Okcident-germanujo invitas vin al Germana Esperanto-Kongreso, Herzogstr. 79, Pentekoston 1965. Esperantlingvaj urbprospektoj sendas: Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf, Ehrenhof.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn de nia movado per korespondado. Petu detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Filatelistoj atentu! 36 glumarkojn, belafrankitan unuatagkoverton kun esperantlingva poŝtstampo speciala por 5 respondkuponoj ĉe Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston 1965, D-4-Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Por internacia Esperanto-ekspozicio junion 1965 ni bezonas esperantlingvajn prospektojn, afiŝojn, fotojn ktp. Sendu kontraŭ rekompenco al Germana Esperanto-Kongreso, D-4-Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Peter Laufen atentigas pri adresŝanĝo: 4686 Rue Parthenais, Montreal, Quebec, Kanado.

Korespondi pri sciencaj aferoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn deziras 26-jara inĝeniero Yasuo Isihara, Tuzidou Danti 13-3-306, Tuzidou 7181, Huzisawa, Japanujo.

INTERNACIA ELPAROLO — la konata disko eldonita de UEA estas nun ricevebla ankaŭ kun multobligita teksto de la enhavo. Mendante, bv. indiki ĉu kun la teksto (entute 1,70 gld., 6,8 st.) aŭ sen la teksto (1,50 gld., 6 st.). La teksto aparte kostas 0,20 gld. (0,80 st.).

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

esperanto
majo 1965

ESPERANTAJ - FRANCAJ - ELDONAJ

MARMANDE - Francujo

Doktoro L. L. Zamenhof

broŝ. bind.

FUNDAMENTO de ESPERANTO

(5-lingva - 355 paĝoj) 38 st. 50,4 st.

LINGVAJ RESPONDOJ 130 p. 23 st. 31,4 st.

HAMLETO bind. ilustr. 206 p. 40 st.

J. P. Sartre

broŝ

SEN ELIRO - LA RESPEKTEMA

P... 111 p.

(en traduko de Roger Bernard) 24,5 st.

Serio da DEK infanlibroj,
kolorilustr.

28,5 st.

Jean Bacquer

LA KUNPRINCLANDO ANDORO

73 p. 60 fotoj 23 st.

**MENDU de EDITIONS FRANÇAISES
d'ESPERANTO**

11 rue Paul Vergne - MARMANDE - Francujo

Poŝtĉekkonto: 30-900 Bordeaux

(ĉiuj prezoj afrankitaj)

**ESPERANTISTA KAMPADEJO
PRIMOŠTEN**

ĉe la bordo de

Adriatiko

invitas vin.

Venu

vi ĝuos

lazuran maron

mediteranean klimaton

esperantistan etoson

unikan turistan observatorion.

Loĝebleco

sub tendo

en privataj domoj

en vilaostilaj hoteletoj.

Prezoj nealtaj. Kompleta penslono kostas de
2 ĝis 4 kaj duono da usonaj dolaroj por ĉiu
tago kaj persono, depende de la sezono kaj
elektita loĝloko.

Esperantistoj ĝuas rabaton.

Ĉiujn informojn donas:

Internacia Esperanto-kampadejo **PRIMOŠTEN**
ĉe Šibenik

Jugoslavio

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (53,3 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la ReINETTE — Pippelingstraat, Bruselo 1


Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio de Lermontovaj verkoj en Esperanto

Moderna plasta kovrilo

Prezo: 5,- gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Ĝus represita !

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16 500 ekzempleroj presitaj de la internacia kaj naciaj eldonoj ! Bone uzebla tiel por kursoj kiel por memlernantoj. Instruas ĉiujn novajn vortojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Liverata kun instrukcioj en A, Da, F, G, H, Ne, No k.a. lingvoj laŭ elekto de la mendanto. Prezo: 13 steloj (3,25 gld.) plus afranko. Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO

Esperantista Kulturdomo
Kastelo Gresillon
BAUGÉ (M-&-L) Francujo

KULTURAJ KAJ INTERNACIAJ FERIOJ

(25-a de Julio - 8-a de Aŭgusto 1965)

KULTURO: Dank' al altvaloraj prelegoj, aparte tiuj de Profesoro Vilho SETÄLÄ el Finnlando, D-ro Bormann el Germanujo kaj Profesoro Michel DUCGONINAZ el Francujo.

TURISMO: En tre agrabla histori-riĉa regiono, krom vizito al PARIZO (petu la specialan informilon), vizito al LE MANS; tuttaga ekskurso al LOIRE-kasteloj; posttagmeza vizito al la Zoologia Ĝardeno en LA FLÈCHE; nokta subĉiela spektaklo en LE LUDE.
....kaj plej internacia etoso !

Helsingör

La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esp-kursoj (1. perfektiga, 2. konversacia - kaj 3. prepara kurso por naturmetodaj instruantoj) en La internacia Altlernejo en Helsingør (Danlando), belega loko en parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando

LEGU !

antaŭ la vojaĝo al Vieno

"VIENAJ LEGENDOJ"-N

44 paĝoj 4 steloj

dum la veturado al Vieno

"DISTRA KOKTELO"-N

128 paĝoj 10 steloj

Mendojn akceptas la organiza komitato de "Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965", Wien, XV. Fünfhausgasse 16, Aŭstrio.


Por mi la nomo signifas Kvalito !



ELEKTRO MULTE FACILIGAS MIAN LABORON. Sed devante mezuri miajn elspezojn laŭ limigita buĝeto, mi prefere aĉetas mastrumajn aparatojn kiuj, de jaro al jaro, fidele servas min. Krome, mi postulas kontentigan garantion kaj senriproĉan teknikan servon. Tiu ĉi polvosuĉilo estas produkto de Philips.



MI NE POVAS IGI LA SUNON BRILI, sed ŝalti sunlampon estas facile. La nia estas produkto de Philips - ĉar ni scias ke tiu nomo estas fidinda. Kaj rigardu niajn vizaĝojn! Ĉu ni ne aspektas kvazaŭ ĵus revenintaj de sunplenaj ferioj?



JEN KIO PLEJ PLAĈAS AL MI.... kvietaj vesperaj horoj, malstreĉiĝo en familia rondo.... kun gazetoj, televido kaj agrabla babilado. Nia TV kaj preskaŭ ĉiuj lampoj en nia hejmo estas faritaj de Philips. Multaj dommastrinoj estas kiel mi; ili emas resti fidelaj al marko konata kaj fidata.

fido al **PHILIPS** estas tutmonda



Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaĵ-industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.